

中國報道

EL POPOLA

# CINIO





Danco sur stilzoj

Foto de SU YAOTING





## INTER NI

### Pri Majorie Fuller

Sur la kovrilo de numero 7, 1990, vi prezentis la portreton de la usonanino vivanta en maljunulejo en Harbin. Ŝia sorto vere tiklas mian fantazion! Kial kaj kiam ŝi transloĝiĝis en Ĉinion? Ĉu vi povas intervjui ŝin? Ĉu ŝi havas kontakton kun Usono? k.t.p.

**HALDO VEOIN** (Svedio)

*La maljuna usonanino, zorgata de s-ro Haldo Veoin, nomiĝas Majorie Fuller. En la komenco de la 40-aj jaroj ŝi transloĝiĝis en Ĉinion pro la okaziĝo de la milito kaj sia malfeliĉo de edzeco. Ŝi havas neniun parencon en Usono. Ŝia solfilino de longe vivas ĉe ŝi, kaj nun ambaŭ en la maljunulejo. Ili estas bonĉe zorgataj de la ĉina registaro kaj portas amikecon al Ĉinio. Ŝi al kutimiĝis al la klimato, medio kaj vivmanieroj de la Nordoriento, tial ŝi ne volas reveni al Usono. Dankon pro la zorgo de s-ro Haldo Veoin! Ni kredas, ke s-ino Majorie Fuller feliĉe vivos en Ĉinio kune kun sia filino.*

*Ankaŭ hinda leganto zorgas pri tiu maljuna usonanino kaj donis al ni similajn demandojn. Li admiris, ke tia maljunulejo estas malofte vidata en Azio.*

**La Red.**

# ENHAVO

21 **Hunan, loko konata, sed multe ŝanĝiĝinta**

26 **Pomĝardenoj sur alta monto**

6 **VOJAGO EN TIBETO (III)**

Ora turisma vojo

37 **Akompanistinoj de maljunuloj en Ŝanhajo**

30 **"Legomkorboj" de pekinanoj**

40 **Printempo ĉe pramejo (novelo)**

52 **EL ĈINAJ GAZETOJ:**

De kie komenciĝas la antikva silka vojo?

43 **AMUZOJ**

38 **Brika skulpturo de Hezhou**

28 **TRA LA MONDO:**

Sabloskulpturo

18 **MEDICINA KONSULTEJO:**

Yang Wenshui, fakulo de kuracado de ostomedolito

47 **LOĜDOMOJ KAJ MOROJ:**

Jurto — domo sur stepo

36 **MODERNAJ VESTOJ:**

Ŝaflana mantelrobo kaj ŝalo

14 **HOMOJ NEFORGESEBLAJ (1):**

Fedorĉak

10 **Novjara renkontiĝo de EPC-legantoj**

16 **Vivecplena Qingdao-a Esperanto-Asocio**

19 **SUR NIA LIBROBRETO:**

Skoloj kaj soluloj, kiuj pensis alie

20 **ESP-NOVAĴOJ**

42 **POR KOMENCANTOJ:**

Mi amas printempon

4 **INTER NI**

42 **KORESPONDI DEZIRAS**

44 **KURANTAĴ AFEROJ**

**SUR LA KOVRILO:**

Tibetaj virinoj ĝojas pro riĉa rikolto

Foto de XUE CHAO

2 **Danco sur stilzoj**

Foto de SU YAOTING

4 **Orkideo**

Foto de LIU SIGONG

54 **La Nacia Cirka Trupo de Sovetunio en Ĉinio**

Fotoj de CAI HAIFENG

34 **Kosmetika Lernejo Monita**

Fotoj de CAI HAIFENG

53 **Glazura Pagodo Feihong**

Fotoj de YAN JIN


**SUR LA DORSKOVRILO:**

**[ĈINAJ POŝTMARKOJ]**

Kajtoj

## LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO


1. Qingdao (p. 16)
2. Lingbao-gubernio (p. 26)
3. Xigaze (p. 6)
4. Jishan-gubernio (p. 18)
5. Linxia-a Huj-nacieca Aŭtonoma Subprovinco (p. 38)



VOJAĜO EN TIBETO (III)

# Ora turisma

Teksto kaj fotoj de LI QIANG




La urbeto Zhangmu ĉe landlimo




La montpinto Xixabangma



# vojo




La templo Zashilunbu



Ŝtona budho apud ŝoseo

La valo Zhangmu



**Z**HANGMU-pasejo troviĝas meze en la suda montodeklivo de Himalajo. Tie super valo kuŝas malgranda ponto — Amikeca Ponto kaj trans la valo estas la neĝmonta reĝlando Nepalo. De post kiam Zhangmu-pasejo malfermis sian pordon, multaj fremdlandaj turistoj vojaĝintaj en Tibeto eliris el Ĉinio tra la pasejo. La parto de la Ĉina-Nepala Ŝoseo en Tibeto kondukas de Lhasa al Zhangmu-pasejo tra Xigaze, Lhaze, Dingri, Nyalam kaj aliaj guberniaj urboj. Survoje oni povas viziti la templojn Zhashilunbu kaj Sajia kaj rigardi la montpintojn Ĝomolangma kaj Xixabangma. Ĝuste pro tio la ŝoseo estas nomata de fremdlandaj turistoj kiel ora vojo.

Post 2-taga restado en Lhasa mi veturis laŭ la ŝoseo al Himalajo. Post ekfunkcio de la Sichuan-Tibeta kaj Qinghai-Tibeta Ŝoseoj en 1954, en la Tibeta Aŭtonoma Regiono jam aperis 15 trunkaj ŝoseoj kun pli ol 300 branĉoj, kaj tiel formiĝis ŝosea reto kun Lhasa kiel la centro. Dank' al sia internacia pozicio estas multe atentata la Ĉina-Nepala Ŝoseo. En 1987 la ĉina registaro investis 100 milionojn da juaĵoj por rekonstrui ĝian danĝeran parton.

Kiel la dua urbo de Tibeto, Xigaze en la tibeta lingvo signifas farmon kun la plej fekunda grundo. La loko estas riĉa je densaj arbaroj kaj grasaj herbejoj. Sur la kampo prosperas plantaĵoj kaj floras violaj poligonofloroj kaj flavaj kolzofloroj. Eble pro la prosperaj plantaĵoj, kiuj produktas sufiĉe da oksigeno sub bona fotosintezo, aŭ pro tio, ke mi jam pasigis multajn tagojn en Tibeto, mi iris en Xigaze per facilaj paŝoj, sed ne tiel anhelante kiel en Lhasa, malgraŭ ke la loko estas alta je 3 800 m. super la marnivelo.

En Xigaze ni vizitis la faman templon Zhashilunbu. Same kiel en aliaj budhismaj temploj de Tibeto, tie estas sutro-halo, ĉefa halo, budha statuo kaj freskoj, kaj



Ŝafaro ĉe la piedo de Himalajo

vivas lamaoj. En la ĉefa halo staras orita kupra Majtrejo 26.7 m. alta kun ŝultroj larĝaj je 11.5 m kaj manoj longaj je 3.2 m. Ĝi estas la plej granda kupra budho en Ĉinio.

En Xigaze troviĝas loĝejo de ĉiuj Banĉen-lamaoj. De post kiam Banĉen la Kvara plivastigis la templon Zhashilunbu en 1600, tie loĝis Banĉen-lamaoj de ĉiuj generacioj. En la templo staras la relikvostupao por Banĉen la Kvara kaj tiu por Banĉen de la Kvina ĝis la Naŭa. La arĝentita relikvostupao por Banĉen la Kvara 11 metrojn alta kun ora-argenta soklo estas inkrustita per perloj kaj gemoj. En ĝi estas la relikvo de Banĉen la Kvara. La relikvostupaoj por aliaj Banĉen-lamaoj estis detruitaj en la tumultaj jaroj. En la lastaj jaroj oni konstruis en la templo grandan stupacon por iliaj relikvoj. Januare de 1989, Banĉen la Deko venis de Pekino en Xigaze kaj prezidis la inaŭguron de la stupao. Neatendite post kelkaj tagoj li forpasis en Xigaze.

En Pekino mi plurfoje vidis Banĉen la Dekan. Li afabla, ĉiam parolis kun rideto. En la templo Zhashilunbu mi respektplene rigardis la korpon de Banĉen la Deko kaj prezentis al li blankan

silkan rubandon. Nun oni traktas kaj gardas lian korpon laŭ tradiciaj tibetaj manieroj. En la ĉefa halo lia korpo majeste sidas sur trono kaj sur la incensa tablo antaŭ la trono estas bovlo, tambureto, sekaj fruktoj kaj eterne lumanta lampo. Meze de la grandioza halo ĉ. 20 lamaoj estis recitantaj sutrojn. Iu juna lamao diris al mi, ke oni recitis sutrojn ĉi tie 24 horojn ĉiutage de la forpaso de la majstro Banĉen ĝis la finkonstruo de lia stupao kaj la enstupaiĝo de lia korpo.

Veturinte el la urbo Xigaze, oni povas vidi ambaŭflanke de la ŝoseo plantaĵojn rikoltotajn kaj arojn da bovoj kaj ŝafoj. Proksimiĝinte al la gubernia urbo de Lhaze, la aŭto suriris sur tervojon kaj kondukis nin al nove konstruita banejo de termofonto kaj tie ni komferte banis nin. La mastro diris, ke la ĉi tiea termofonto povas kuraci artritron, dermitron, paralizon de la gamboj k.a. Ĉiujare en la frua printempo multaj tibetanoj kaj preterpasantaj pilgrimantoj venas tien por sin bani.

Post nelonge kiam ni forlasis Lhaze, nia aŭto komencis suriri monton. Trapasinte la monton Jiaco altan je 5 220 m. super la marnivelo, nia aŭto malsupren-





Nepalanoj vizitintaj foiron en Ĉinio

iris laŭ la milda montodeklivo. Nia ŝoforo ofte iris tiun vojon. Li informis al mi, ke tie ne troviĝas loĝantoj, tamen ofte vidiĝas ĉamoj kaj aliaj sovaĝaj bestoj. Kiam aperis ĉe la ŝoseo novformaj etaĝdomoj nia ŝoforo diris, ke la domoj estas hotelo de Dingri-gubernio. En Xigaze, Dingri, Nyalam kaj Zhangmu ĉe la Ĉina-Nepala Ŝoseo funkcias hoteloj por alilandaj turistoj. Kvankam la kondiĉoj estas ne dezirataj, tamen ili multe helpas al la turistoj.

Finfine aperis antaŭ mi la montpinto Ĝomolangma 8 848 m. alta super la marnivelo. Ĝi, la plej alta montkresto de la mondo, estas nomata la tria poluso de la tero. Bedaŭrinde la vetero ne favoris nin, mi povis ĝui ĝian kreston el la nubaro. Por mi ĝi fariĝis pli mistera.

Estas menciinde, ke ĉe la montpiedo mi renkontis germanan biciklanton. Lia biciklo estis ŝargita per necesajoj por lia vojaĝo kaj sur ĝia framo pendis mapotabulo, sur kiu li notis lokojn vizititajn. Li jam biciklis 335 000 km. Rigardante Ĝomolangma kaj aliajn neĝkovritajn montpintojn dekstre de ĝi, li starigis sian dikan fingron kaj

rigide diris en la ĉina lingvo: "Tre bone! Tre bone!" Estis legebla sur lia vizaĝo emociiĝo.

Nyalam estas malgranda urbo. Ĵus elirinte el ĝi, ni eniris en la grandan valon Zhangmu, la plej belan el la tri famaj valoj de Himalajo. Ĉe la enirejo de la valo la ŝoseo abrupte malsupreniĝis. Maldokstre de la vojo staras alta krutaĵo kaj dekstre de ĝi estas vertiĝodona valo dekojn da metroj profunda. Torenta akvo falas de supre kaj zigzagas inter la rokoj, aŭdigante tondran bruon. La blankaj ŝaŭmoj estiĝintaj de akva frapado sur la rokoj ŝvebas en la valo. Sur la alta krutaĵo pendas akvofaloj kaj nia aŭto ja iris inter tiuj akvaj kurtenoj. La vojo estas longa je pli ol 20 km. Nia aŭto malsupreniris de frosta montregiono alta je pli ol 3 000 m. super la marnivelo al la arbaro de la subtropika zono alta je ĉ. mil m. super la marnivelo. Survoje ĉie vidiĝas ĉarma pejzaĝo.

Pro la alteco kaj kruteco, tie la vojo estas rigardata kiel la plej danĝera parto de la Ĉina-Nepala Ŝoseo. Nia aŭto devigite haltis en loko distanca de Zhangmu-urbeto je 2 km., ĉar la vojo estis detruita

de kot-roka fluo kaj ni devis piediri la zonon minacatan de falantaj ŝtonoj. De tempo al tempo aŭdigis, ke rokoj krevas. Pro tio neniu el ni kuraĝis iri plu. Tiam iu lokano diris, ke la ŝtonoj estas baritaj de platformo kaj ne endanĝerigas la vivon de la ĉi tieaj irantoj. Tial ni ekkuris sekvante lin.

Trapasinte la zonon de fluantaj rokoj kaj preteririnte monto-kurbiĝon, ni atingis la plej altan lokon de Zhangmu-urbeto. Malsupren rigardante ni vidis, ke ĝi estas monturbeto kun distanco je 200 m. de supre malsupren. La loĝdomoj, magazenoj kaj oficejaj domoj sidas sur malsamaj niveloj. La Nyalam-a Doganejo kuŝas en la plej malsupra nivelo, kie flagras la nacia flago de la Ĉina Popola Respubliko. Ĝi estas unu el la gravaj pordoj de la Sudokcidento de Ĉinio. Post la doganejo etendiĝas 100-metra strateto, ambaŭflanke de ĝi plejparte loĝas ŝjarbanoj, kiuj funkciigas butikojn de manĝaĵoj kaj aliaj objektoj. La Nyalam-a Doganejo ne troviĝas ĉe la landlimo. Ĝi distancas de la landlima Amikeca Ponto je 8 km.

Ĉe Zhangmu-pasejo mi vidis pli ol 20 eŭropajn turistojn. Elirinte el la aŭto, ili ne povis transporti siajn pakaĵojn, kaj iuj lokanoj helpis ilin porti la pakaĵojn trans la zonon de falantaj rokoj ĝis la hotelo najbare de la doganejo kontraŭ 10 juaĵoj. Forlasinte Zhangmu, la elmigrantoj sin direktas al la ŝoseo de Nepalo trans la Amikeca Ponto, kiu estas distanca de Katmanduo je pli ol 100 km. ■



Veteranaj esperantistoj en la renkontiĝo



En la renkontiĝo

# Novjara Renkon

# EPĈ-Legantoj

S-ro Dokmanovic Gorge (maldekstre) ĉe la libroekspona tablo





S-ro Nomura Kusuma (la unua de maldekstre) kaj ĉinaj esperantistoj

# tiĝo de

Teksto de ZHANG QINGZHEN

Fotoj de SI GONG kaj YAN JIN

Pupteatra ludo



En amuza konkurso



**L**A 11-an de januaro 1991, la redakcio de El Popola Ĉinio (EPĈ) okazigis en Pekino la Novjaran Renkontiĝon de EPĈ-Legantoj. La renkontiĝon partoprenis pli ol 200 esperantistoj. Ili estis pekinaj EPĈ-legantoj, laborantoj de la Esperantaj sekcioj de Radio Pekino kaj la Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio (GUOJI SHUDIAN), membroj de la Pekina E-Asocio, studentoj de la E-kurso de la Pekina Radioelsenda Instituto kaj laborantoj de la redakcio de EPĈ. Ĝin partoprenis invitite ankaŭ s-ro Dokmanovic Gorge, jugoslava leganto de EPĈ, kaj s-ro Nomura Kusuma, japana leganto de EPĈ.

La tabloj de la kunveno estis plenaj de trinkaĵoj, fruktoj kaj etmangaĵoj. Sed partoprenantoj ne havis tempon ĝui ilin kaj anstataŭe interparolis intime. Ĉe la enirejo, ĉirkaŭ la libroekspozicia tablo kolektiĝis nemalmultaj esperantistoj. Ili foliumis aŭ aĉetis novajn gazetojn kaj librojn. La nombro de partoprenantoj estis sufiĉe granda, kion la organizantoj ne atendis. En la

kunveno regis gaja atmosfero.

En la renkontiĝo multaj esperantistoj prezentis programerojn. Inter ili estis ŝatataj la fragmentoj de la pupteatroj "Wu Song Mortigas Tigron" kaj "Zhu Bajie Surdorse Portas Virinon" luditaj de s-ro Li Qianyuan, esperantisto de la Ĉina Pupteatra Trupo.

En 1978 li kun la Ĉina Pupteatra Trupo partoprenis en la 11-a Internacia Pupteatra Festivalo okazinta en Jugoslavio. La pupteatro "Ribelo kontraŭ la Ĉiela Palaco" ludita de la trupo estis tre ŝatata de la lokaj spektatoroj. An Ziming de la trupo gajnis la premion de lingvo de la festivalo.

En la renkontiĝo estis prezentitaj multaj programeroj, kiaj kanto kun akompano de gitaro, virvoĉa solkanto kaj ĥoraĵo. En ĝi oni faris ankaŭ amuzajn, konkurson kaj loterion. Iuj partoprenantoj estis kaj aktoroj kaj spektantoj. La ŝnurtira konkurso inter laborantoj de la redakcio kaj legantoj de EPĈ plivigligis la atmosferon. Aŭdiĝis foje-refoje aklamoj "Penu, penu!". Fine, la legantoj sukcesis en la konkurso kaj gajnis la premion.

Jam de la komenco de la renkontiĝo s-ro Dokmanovic Gorge okupiĝis pri filmado. Li filmis preskaŭ ĉiujn scenojn de la renkontiĝo. Profitante la okazon, mi interparolis kun li. Li estas inĝeniero pri mekanismo kaj legas EPĈ de 10 jaroj. Li diris al mi, ke artikoloj pri nacia kulturo multe plaĉas al li kaj li estas amatoro de filmado. Li trovis la renkontiĝon tre interesa. Li portis la videobendon al sia patrolando, por ke liaj familianoj, parencoj kaj amikoj spektu ĝin.

Eksonis ritma muziko kaj Jiang Dahai, studento de la Pekina Radioelsenda Instituto, dancis krevdancon. Li ludis ĉefan rolon en la televida E-kurso Espero. La partoprenantoj ĝojis ĝui tiel belan dancon. Kelke da junuloj venis al la centro de la kunveno kaj dancis kune kun li. Poste, oni ludis belan muzikon kaj paro post paro da dancoamantoj dancis ĝojplene.

Finiĝis duhora renkontiĝo, tamen samideanoj ankoraŭ interparolis kun entuziasmo, precipe tiuj, kiuj konatiĝis en la renkontiĝo. Mi

Esperantisto-filatelisto en la renkontiĝo




vidis, ke du knabinoj reciprokas vizitkartojn. Unu el ili studas en la Pekina Ekonomia Instituto. Ŝi lernis Esperanton kelkajn monatojn en la televida E-kurso. Estis la unua fojo por ŝi partopreni renkontigon de esperantistoj. Ŝi trovis ĝin tre interesa, kaj ŝi sentis, ke ĉiuj esperantistoj estas afablaj kiel malnovaj amikoj.

Mi intervjuis la faman verkiston kaj tradukiston Chun-Chan Yeh, vicprezidanton de la Ĉina E-Ligo. Kiam mi petis lian opinion pri la renkontigo, li diris kun serena rido: "La renkontigo estas aparte interesa. Ĝi donis al mi jenajn impresojn. Unue, ĝi estas vivoplena. Preskaŭ ĉiuj aktivuloj de nia movado en Pekino ĝin partoprenas kaj faras amikajn kontaktojn; due, ĝia atmosfero estas gaja kaj agrabla. La renkontigon partoprenas samideanoj junaj, mezaĝaj kaj maljunaj. En ĝi la maljunuloj, kia mi, kvazaŭ fariĝis pli junaj. Tio spegulas spiriton kaj temperamenton de esperantisto. Mi esperas, ke ni havos pli da tiaj renkontigoj." ■




Laborantoj de la redakcio antaŭ la renkontigo

Krevdanco



Ŝnurtira konkurso



## HOMOJ NEFORGESEBLAJ (1)

*Ekde ĉi numero ni publikigos artikol-serion "Homoj Neforgeseblaj". La aŭtoro estas fama ĉina filologo, prezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo, membro de la Honora Patrona Komitato de UEA kaj membro de la Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino.*

*Li eklernis Esperanton en 1931. En Esperantujo li konatiĝis kaj amikiĝis kun multaj alilandaj samideanoj. En tiu ĉi artikol-serio li prezentos al ni kelkajn el ili. Ordinaraĵ aŭ eminentaĵ, ili ĉiuj estas neforgeseblaj por li.*

La Red

# Fedorĉak

de CHEN YUAN

**L**A unua fremdlanda esperantisto renkontita de mi estas Fedorĉak. Li estis hungaro, elektra inĝeniero, specialisto, kiu helpis Sovetunion en ĝia Unua Kvinjara Plano, kaj unu el la aŭtoroj de "La Historio de la Fabriko"<sup>1</sup> iniciatita de Gorki. En 1933 li venis de Sovetunio al Ŝanhajo<sup>2</sup> kaj en la 30-a de aŭgusto 1934 atingis Kantonon<sup>3</sup>; la 4-an de septembro la lernantoj de la kurso de la Kantona Esperanto-Instituto<sup>4</sup> kunvenis por bonvenigi lin, tiam mi ĉeestis.

Mi ricevis leteron de Joĉaŝien<sup>5</sup> de la Ŝanhaja Esperantista Ligo<sup>6</sup>, kiu informis, ke Fedorĉak mallonge restos en Kantono, kaj mi trovis lin en la "pleba domo" de Kantono. La "pleba domo" estis malgranda gastejo starigita de filantropia institucio. Antaŭe ĝi estis templo. Oni purigis la frontan halon kaj metis en ĝin 20-30 lig-



La aŭtoro

najn litojn. La unu-lita lupago por ĉiu tago estis nur 10-20 centoj. Tie loĝis malriĉaj instruistoj, lernantoj, oficistoj kaj kamparanoj venintaj de diversaj gubernioj al Kantono por viziti parencojn aŭ serĉi okupon. Kiu akceptis Fedorĉak? Kial li loĝis

tie? Tion mi ne sciis, ĉar tiam mi estis mezlernejano. Tiutage posttagmeze, mi iris kun Esperanta vortaro por serĉi lin. Mi posedis malmulte da Esperantaj vortoj kaj timis, ke mi ne komprenos lian parolon.

Neatendite, ĉe la unua vido

ni ne sentis nin fremdaj unu al la alia. Li flue parolis Esperante, sed mi nur povis balbuti. Kvankam en la lernejo mi ĉiutage kontaktis alilandanon (nia anglalingva instruisto estis maljuna anglino), tamen por mi estis la unua fojo interparoli kun alilanda esperantisto. Ekde tiu tago, ĉiutage post la leciono mi iris al Fedorĉak kaj interparolis kun li unu aŭ du horojn. Li estis parolema, multe travivis kaj eĉ vizitis Sovetunion, kiun sopiris ni junuloj, tial nia interparolo ĉiam daŭris longe. Mi aŭskultis lian rakonton pri la nova lando same kiel pri fantazio kaj estis tre ekscitita. Mi forgesis preskaŭ ĉion, pri kio ni interparolis. Mi memoras nur lian kritikon, ke Ĉinio havas tro multe da loĝantoj. Mi diris, ke estas neniu kontraŭrimedo, ĉar post geedziĝo oni naskas infanojn. Li diris, ke oni povas kontraŭkoncipi (mi ne komprenis la vorton kaj tuj konsultis la vortaron). "Ĉu estas facile kontraŭkoncipi?" mi demandis. "Troviĝas ilo kaŭĉuka," li respondis. (mi ne komprenis la sencon de kaŭĉuko kaj tuj konsultis la vortaron). Ĉiutage mi aŭskultis kaj parolis, tiel mi povis ne nur legi kaj skribi, sed ankaŭ paroli Esperante. Li estis tre lerta paroligi min. Nun mi povas paroli ne balbute, tion mi ŝuldas al mia ĉiutaga interparolado kun Fedorĉak. En militaj jaroj mi longe ne uzis Esperanton, sed poste mi ankoraŭ povis paroli ĝin facile, ankaŭ tion mi devas ŝuldi al Fedorĉak. Maljunaj ŝanhajaj esperantistoj diris, ke Fedorĉak faris gravan aferon en Ĉinio, t.e. paroligi ĉinajn esperantistojn, kiuj estis mutaj ĝis tiam. Tion mi vidis.

Kien iris la inĝeniero, forlasinte Kantonon? Ĉu li revenis en sian hejmlandon? Tion mi ne sciis. En 1956 mi renkontis

en Kopenhago junan Morton de la Hungara Esperantista Asocio kaj demandis lin pri Fedorĉak, sed li ne konis lin. En 1958 mi renkontis en Bulgario hungaran pentriston Noli-pa, eminenta esperantisto. Kaj li donis ankaŭ nean respondon. En 1985 mi atingis Budapeŝton, loĝis tie en komputila instituto kaj kontaktiĝis kun hungaraj esperantistoj, sed neniu el ili aŭdis pri la nomo Fedorĉak.

Eble tiu hungaro, kiu helpis Sovetunion en ĝia socialisma konstruado, tiu entuziasma instruanto, kiu kuragiĝis komencantojn paroli Esperante, perdiĝis en milito. Tamen li vivos por ĉiam en la koro de la maljunaj ĉinaj esperantistoj. ■

1. "La Historio de la Fabriko" kompilita ĉefe de Gorki enhavas interesajn

rakontojn de usonaj laboristoj pri ilia laboro en Sovetunio. Mi legis ĝian unuan volumon. Poste ĝi ĉesis eldoniĝi pro la forpaso de Gorki.

2. Vidu "Esperanto-movado en Ĉinio" de Hou Zhiping, p.44, sub (12) de 1934.

3. Vidu "Kroniko de Esperanto-movado de Guangdong-provinco antaŭ la Fandiĝo de la Nova Ĉinio" de Li Yisan, "Verda Spiko", unua numero, 1990, sub (17) de 1934.

4. La Kantona Esperanto-Instituto estis funkciigata de la Eduka Buroo de Kantono. Ĝi fondiĝis en 1926 kaj finiĝis en 1937, kiam eksplodis la Kontraŭjapana Rezistmilto. La lernado daŭris duonjaron kaj oni donis lecionon vespere. Mi studis Esperanton tie en 1931-1932.

5. Joĉaŝien, laboranto de la Ŝanhaja Esperantista Ligo. Li faris multe da laboroj de organizado, eldonado kaj distribuado kaj forpasis en 1950 pro malsano.

6. La Ŝanhaja Esperantista Ligo fondiĝis en 1933. Ĝi estis la centro de la ĉina progresiva Esperanto-movado kaj prezentis la sloganon "Per Esperanto por la Liberigo de Ĉinio".

## ABONTARIFO DE EPĈ POR 1991

Lando	Valuto	1 jaro	2 jaroj	3 jaroj
Aŭstralio	AUD	16.00	26.00	36.00
Aŭstrio	ATS	215	360	500
Belgio	BEF	620	1020	1400
Germanio	DEM	32.00	54.00	76.00
Britio	GBP	9.50	15.00	21.00
Finnlando	FIM	72.00	117.00	163.00
Francio	FRF	102.00	165.00	225.00
Hispanio	ESP	1550	2500	3500
Italio	ITL	20600	33500	46500
Japanio	JPY	3000	5400	7500
Nederlando	NLG	35.50	61.00	85.00
Nov-Zelando	NZD	21.70	36.00	50.00
Portugaliao	PTE	1550	2500	3500
Svisio	CHF	26.80	44.00	64.00
Usono	USD	15.50	26.00	36.00
Kanado	CAD	15.00	25.00	35.00
<b>Por aliaj landoj en Eŭropo:</b>				
	USD	11.50	18.50	26.00
<b>Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko:</b>				
	USD	7.80	12.50	17.50

# Vivecplena Qingdao-a Esperanto-Asocio

Teksto de ZHANG QINGZHEN

Fotoj de la Qingdao-a Esperanto-Asocio

**J**UNIE de 1988 mi spektis la premieron de la porinstrua Esperanta televidfilmo "Espero" en Qingdao, Shandong-provinco, kaj raportis pri ĝi en nia revuo. La sukcesa farado de la televidfilmo montris ne nur la unuiĝon kaj kunlaboron de ĉinaj esperantistoj, sed ankaŭ la laboron de la Qingdao-a Esperanto-Asocio (QEA) kaj disvolvigon de la Qingdao-a E-movado.

Du jarojn post tio, la Qingdao-a E-movado akiris rimarkindan progreson. Lastatempe mi vizitis QEA, kontaktiĝis kun esperantistoj en Qingdao kaj esploris multajn laborojn faritajn de QEA por la Qingdao-a E-movado.

Kiel naskiĝis la televidfilmo "Espero"? Lokaj esperantistoj konigis al mi, ke iuj esperantistoj de la urbo plej frue proponis fari tian filmon. Ili bezonis figuran materialon por sia lernado. Poste ili prezentis la proponon al la urba partia komitato kaj koncernaj depar-

tementoj. Tiu ĉi propono estis subtenata de Liu Zhen, gvidanto de la urba partia komitato.

Ekde oktobro de 1987, QEA faris la televidfilmon "Espero". Tio daŭris 8 monatojn. La scenaro de la televidfilmo estis reviziita de fakuloj foje refoje. QEA elektis rolulojn, ekzercis ilin en Esperanta parolo kaj respondecis pri la farado de la televidfilmo kun movbiloj. La filmado estis farita kunlaboro kun Radio Pekino, la Ĉina Esperanto-Ligo kaj la redakcio de El Popola Ĉinio.

La televidfilmo estis laŭdata de Esperantaj organizaĵoj kaj fakuloj en- kaj eksterlandaj.

En 1988 en la kunveno de la societo "Amikoj de Esperanto" okazigita en Pekino, oni projekciis la televidfilmon. Veteranaj esperantistoj, kiuj ĉeestis la kunvenon, ĝoje diris, ke ĝi estas la unua porinstrua Esperanta televidfilmo, kiun ili ĝuis. Rigardinte la televidfilmon, s-ro Roman Dobrzynski, pre-

zidanto de la Pola Esperanto-Asocio, diris: "Antaŭe oni opiniis, ke Esperanto estas eŭropa, sed hodiaŭ vidinte, ke la orientanoj faris tian altnivelan porinstruan Esperantan televidfilmon, mi admiras. De pluraj jaroj mi ĉiam konsideris fari tian aferon, neatendite tion faris Qingdao-anoj. En Qingdao eksplodis revolucio de Esperanta instruado."

Post la finiĝo de la filmado QEA faris multe da laboroj. En majo de 1990 komenciĝis la televida Esperanto-kurso "Espero" funkciigata kune de ĝi, la Centra Televizio, Qingdao-universitato, Ĉina Esperanto-Ligo kaj redakcio de El Popola Ĉinio. Eble estis la unua fojo en la mondo, ke ŝtata televizio telesendis porinstruan Esperantan televidfilmon. Tio montras, ke la ĉina registaro subtenas Esperanton.

Sub la zorgo kaj subteno de QEA la Esperanta instruado en Qingdao pli kaj pli populariĝas kaj progresas. Surbaze de la televida

S-ro William R. Harmon (la tria de maldekstre) el la Esperanto-Ligo por Norda Ameriko en la Qingdao-a Turisma Lernejo

Instruistino kaj lernantinoj de la Qingdao-a Turisma Lernejo lernas nian lingvon.  
Foto de ZHANG QINGZHEN







E-kurso, en Qingdao oni funkciigas sume 10 Esperanto-kursojn, kiaj tiuj de la elementa lernejo Shangqinglu kaj la 29-a Mezlernejo de Qingdao. En la akompano de laborantoj de QEA mi vizitis la nomitajn kursojn.

La elementa lernejo Shangqinglu akceptas ĉiujare pli ol 1 000 gastojn el Japanio, Pollando, Germanio kaj Usono. Por elkulturi Esperantajn talentulojn, sub la helpo de QEA, la lernejo elektis 30 elstarajn lernantojn por fondi E-kurson. Ili lernas Esperanton po unu horon post la lecionoj merkrede kaj sabate. La porinfana Esperanta lernolibro karakteriziĝas per intereseco kaj figureco, ke infanoj lernas energie. Mi ĝuis du kantojn de la televidfilmo "Espero", kiuj estis prezentitaj de ili en Esperanto.

La 29-a Mezlernejo estas profesia lernejo speciale kulturanta laborantojn por turisma servo. La diplomitoj laboros en hoteloj de la urbo. En la lasta septembro, 160 lernejoj el tri klasoj de la lernejo vizitis E-kurson kaj lernis nian lingvon 4 horojn ĉiusemajne. Mi kontaktiĝis kun kelkaj lernejoj. Ili ekinteresiĝis pri Esperanto post la rigardado de la televidfilmo "Espero".

Akceptante esperantistojn el Usono, Japanio, Sud-Koreio, Belgio, Jugoslavio, Finnlando kaj Svedio, QEA kreis ponton por ekonomiaj kaj komercaj departementoj de la urbo. Helpe de ĝi, vicprezidanto de la Jönköping-a Komerca Korporacio de Svedio, en la nomo de kompanio de sia lando, subskribis en Esperanto komercan interkonsenton kun la Shuiqinggou-a

Partoprenantoj de la prepar-kunveno por la 5-a Pacifika Kongreso de Esperanto

Entreprena Kompanio de Qingdao, kaj konsentis funkcii kiel konsilanto de la kompanio. Vicprezidanto de la Ostenda Komerca Korporacio de Belgio estis titolita kiel honora oficisto de la Qingdao-a Friduja Fabriko. Ankaŭ la Huangxing-a Mangaja Limigita Kompanio de Qingdao starigis laborkontaktan kun manĝaĵfabriko de Sud-Koreio.

Oni povas diri, ke Esperanto estas konata de ĉiuj familioj en Qingdao, kio estas nedisigebla de la propagandado farita de QEA. Rondkolumaj subĉemizoj, faritaj de la Cangkou-a Trikfabriko de Qingdao, surhavas broditajn vortojn "Mi amas Esperanton" kun trikolora marko de Esperanto, kaj estas tre ŝatataj de alilandaj esperantistoj kaj gejunuloj de Qingdao. Nun vendiĝis pli ol 20 000 tiaj subĉemizoj.

Esperantaj brakhorloĝoj kun rulglobetoj kaj dekoraciaj tablorloĝoj, faritaj de la Qingdao-a Brakhorloĝa Fabriko, vendiĝas sur la internacia merkato pere de Esperanto. Nemalmultaj alilandaj esperantistoj skribis kaj sendis monon al la fabriko por aĉeti tiajn horloĝojn. Maje de 1990, la Turisma Karavano de Japanaj kaj Koreaj Esperantistoj vizitis la fabrikon. 13 el ili aĉetis 35 tiajn brakhorloĝojn por si kaj siaj parencoj kaj amikoj. En la lasta julio 100 Esperantaj brakhorloĝoj estis venditaj en Japanio. Estis la unua fojo por la fabriko, ke la brakhorloĝoj kiel eksportaj vendiĝis rekte sur la in-

ternacia merkato.

Kial bone disvolviĝas la Qingdao-a E-movado? Iuj esperantistoj konigis al mi, ke tio dependas de la bone funkcianta QEA. Ĝi fondiĝis en 1986 kaj Liu Zhen, vicsekretario de la urba partia komitato, invitite ĉeestis la fondkunvenon kaj faris paroladon. Li diris: "Se mi estus kvalifikita, mi volus esti membro de la Qingdao-a Esperanto-Asocio." Liaj vortoj favore al la E-movado de la urbo estis multe laŭdataj. QEA invitis lin kiel honoran prezidanton de la asocio. En Qingdao ne nur li, sed ankaŭ diversnivelaĵ gvidantoj, subtenas la Esperantan laboron.

En Qingdao laboras ankaŭ multaj aktivuloj de Esperanto. Ili ne ŝparas tempon kaj energion por studi, propagandi kaj disvastigi la lingvon.

La elstaraj atingoj de QEA vekis atenton de la esperantistaro. Lastatempe QEA prenis sur sin du novajn taskojn. Unu estas, ke ekde 1991, *La Mondo*, la organo de la Ĉina Esperanto-Ligo, estas eldonata kune de la Ĉina Esperanto-Ligo kaj QEA, kaj oni fondos en Qingdao la redakcion de *La Mondo*; kaj la alia estas, ke la 5-a Pacifika Kongreso de Esperanto okazos en Qingdao la 17-an — 22-an de aŭgusto de 1992. Sendube ĝi estas treege kuraĝiga al la tuta esperantistaro de Qingdao. Nun multaj Qingdao-aj esperantistoj, inkluzive de multaj Qindao-anoj, faras preplaboron por sukcesigi la kongreson. ■

# Yang Wenshui, fakulo de kuracado de ostomedolito

de SUN GUOLIANG kaj LI XINCHAO

**L**I Baolin estas kamparano en Jilin-provinco, Ĉinio. Lin turmentis ostomedolito dum dekel-kaj jaroj. Li konsultis kuracistojn kaj elspezis milojn da juanoj por sin kuraci. Kaj fine oni rekomendis, ke li estu amputita. Pro korŝiro li volis mortigi sin. Informiĝinte, ke en la Ostomedolita Hospitalo de Jishan-gubernio, Shanxi-provinco, estas kuracisto Yang Wenshui (en la julia numero de EPC 1988 la nomo estas elparolata kiel Jang Ŭenŝuj), kiu kapablas kuraci ostomedoliton, li veturis tien por peti helpon de la kuracisto. Dank' al lia dumonata kuracado, Li Baolin resaniĝis. Ĉe la adiaŭo, manpremanante kun kuracisto Yang, Li diris kun plorge-mo: "Ho, mia savanto!" Tia kortuŝa sceno ja ne estas malofta en la

hospitalo.

Antaŭ nelonge ni intervjuis ĉefkuraciston Yang Wenshui, la fondinton de la hospitalo kaj membron de la Medicina Akademio sub la Ministerio de Publika Sano de la Ĉina Popola Respubliko. Kompreneble, ni vizitis ankaŭ la hospitalon.

La 49-jara Yang konigis al ni: "Ostomedolito estas nomata ostoputriĝo. Ĝi estas malpli danĝera nur ol maligna ostomo. Atakate de ĝi, oni suferas de ŝvela doloro kaj malfacila moviĝo aŭ de longatempa pusado kaj sangado. Iuj devas esti amputitaj, alie ili mortos. La morbokvanto estas 3%. La malsano povas ataki ĉiujn, ĉu junajn ĉu maljunajn."

Por kuraci ostomedoliton, en la pasintaj pli ol 20 jaroj Yang studis

multe da medicinaj verkoj kaj penis por posedi spertojn kaj medicinajn sciojn akumulitajn de la antaŭuloj en kuracado. Post centoj da eksperimentoj li finfine sukcese elfaris la tre efikan pilolon Sanxian kontraŭ ostomedolito. Antaŭ ĉio, li prove aplikis la pilolon al si mem por koni la dozon. Post tio li sukcese elfaris ankaŭ stangentan medikamenton alometforman, "Ulcerforigan kaj Muskolkreskigan Pulvoron", "Muskolkreskigan kaj Vundoresanigan Pulvoron", "Ostofortigan Ungventon" kaj aliajn kuracilojn kontraŭ ostomedolito. En ostotomio li kompletigis la dialektikajn kuracmetodojn, kiaj senfebrigo kaj sentoksigo, sangcirkula vigligo kaj kongestodisigo, pus-ellaso el ostomedolito kaj kardi-pulma tonikado, kaj kurac-principojn, kiel konsideri la malsanon kaj la tutan korpon samtempe, kombini kuracodon de la fenomenaj malsano kun tiu de la esenca, de la ekstero kun la interno, kaj de kuracado kun korpo-fortigo.

En la vizito ni rimarkis, ke la seanco estas mallonga kaj, ĝenerale dirite, ĝi bezonas nur 3 monatojn, kaj plie, la recidivo estas malofta, la kuracefiko — bona. En la pasintaj 20 jaroj la hospitalo akceptis pli ol 30 000 malsanulojn, el kiuj 91.6% tute resaniĝis post kuracado kaj la resaniĝintoj kaj recidivuloj konsistigis 98% kaj 6.8% de la kuracatoj respektive. Kaj krome, tie la pagopostulo estas racia.

La sukceso de Yang Wenshui estas alte taksata de la medicinistaj rondoj en- kaj eksterlandaj. En


Yang Wenshui (meze) en malsanulejo

Foto de SUN GUOLIANG



## Skoloj kaj soluloj, kiuj pensis alie

de ALBERT GOODHEIR (Skotlando)



**ANTIKAJ FILOZOFOJ DE ĈINIO.** Hoŭ Ĝjueljang. El la ĉina trad. diversaj. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1988. 224p. Prezo: 12,00 gld.

Jen leginda kaj anekdotoplena libro pri la ĉina filozofio ekde ĝia komenco ĝis la 17-a jarcento. Ĝi naskiĝis en la periodo, kiun la germana filozofo Karl Jaspers nomis la "aksepoko" de la homaro, ĉirkaŭ la 6-a jarcento a.K., kiam vivis ankaŭ la unuaj filozofoj en Grekio kaj Hindio. Du grandaj pioniroj, Konfuzio (551-479 a.K.) kaj la preskaŭ samtempa Laŭzio (la libro esperantigas sep el la multaj nomoj) montris la du vojojn, laŭ kiuj evoluis la ĉina pensado.

Konfuzio, humanisto kaj instruisto de privata lernejo, predikis sociajn virtojn: oni respektu la gepatrojn kaj regantojn kaj

konduku filantropie. Laŭzio fidis ne la socion, sed la naturon, kaj kelkfoje li sonas kiel nuntempa "verdulo". Laŭ li, la baza realo "Tao" (nuntempe oni literumas "Dao") ekzistas ekster tempo kaj spaco. La realo havas du aspektojn: *Jang*, aktiva, "vira", kaj *Jin*, pasiva, "ina", kiuj devas esti en ekvilibro. Nuntempaj fizikistoj trovis paralelojn inter tiu baze mistika filozofio kaj la nuna atomfiziko, kiel en la verko *The Tao of Physics*, "La Tao de la fiziko", de la usonano Fridjof Capra.

La ĉina pensado ĝenerale estas monisma kaj pacama, kvankam tiu pacamo malmulte influis la ĉinan historion. Mankas en ĝi glorigado de la milito. Mankas ankaŭ la kartezia dualismo inter menso kaj materio, kiun deknaŭjarcentaj eŭropaj pensuloj provis solvi neante la gravecon

aŭ eĉ ekziston de la materio (ideistoj) aŭ de la menso (materiistoj). La pasintjarcenta fiziko, kiu kontraste al la nuna, kredis je solida materio, ŝajnis favori materiismon. Por Hoŭ "materiisma" signifas "bona", ekzemple Mozio (5-a jarcento a.K.) ne kredis je la sorto, do "brilas je primitiva materiismo".

Ĝenerale laŭ ĉinaj pensuloj la homnatura estas bona, sed estas esceptoj: Ŝjunzio kredis je "aĉa homnatura". Same kiel en la Okcidento ne mankis varieco; ekzistis skoloj kaj solaj pensuloj. Venis neokonfuzianismo; ĝi oficialiĝis kaj, kiel ŝtatideologio ĝenerale, efikis konservative. Sed la ideoj de antikvaj pensuloj gravas en si mem, ne nur pro tio ke ili antaŭdiras hodiaŭajn tendencojn, kiuj mem baldaŭ estos pasintaj. ■

1985 liaj kuracmetodoj estis eksperimentitaj de provinca departemento kaj en la sekvinta jaro la Ŝtata Scienc-teknika Komisiono honoris lin per la titolo "eminenta mezaĝa fakulo". Fakuloj de Britio, Usono kaj aliaj pli ol 10 landoj sendis al li gratulan telegramon. En 1990 invitive li faris prelegon en Usono, kio faris sensacion.

Yang diris al ni: "Mi kuracis pacientojn el 36 nacioj de Ĉinio. Mi deziras sensuferigi ankaŭ alilandajn ostomedolitulojn. Nia hospitalo jam pretigis malsanulajn

ĉambrojn por eksterlandanoj kaj ni volonte kuracos ilin en ĉiu ajn tempo." Estas bone ekipita la hospitalo, por kies fondo kuracisto Yang elspezis milionon da janoj. Ĝi havas pli ol 700 malsanulajn litojn. La elegantaj duetaĝaj malsanulaj domoj sidas inter verdaj arboj. En la hospitalo estas belaj kioskoj kaj artefaritaj montetoj.

La trafiko al Jishan-gubernio estas facila. Se oni veturas de Pekino per la trajno n-ro 35 aŭ 373, oni elvagoniĝas ĉe la stacio Houma, Shanxi-provinco. Se oni vetur-

as de Xi'an per la trajno n-ro 36 aŭ 261, oni elvagoniĝas ĉe la stacio Yuncheng. Nun pli kaj pli multe da malsanuloj iras tien por esti kuracataj. Yang Wenshui deziras, ke ni transdiru al la eksterlandaj pacientoj, ke se ili volas esti kuracataj, ili nepre sciigu tion al la hospitalo letere aŭ telegrafe anticipe, por ke ĝi aranĝu la tagordon de la kuracado kaj sendu iri renkonte al ili ĉe fervoj-stacio. La adreso de la hospitalo: La Ostomedolita Hospitalo (Gusuiyan Yiyuan) de Jishan-gubernio, Shanxi-provinco, 043201 Ĉinio. ■

## ESP-NOVAĴOJ

● En la 26-a de oktobro de la lasta jaro la Dua Konsilantaro de la Ŝanhaja Esperanto-Asocio okazigis la sesan sesion. En la sesio ĝia ĉefsekretario legis la sankcion de la magistrato de Ŝanhajo pri la simpozio sub la titolo "Lusin kaj Esperanto", kiu okazos en septembro de la kuranta jaro en Ŝanhajo.

● De 1988, kiam komenciĝis la radia Esperanto-kurso, funkciigata de la Guangdong-a Popola Radiostacio kaj la Guangdong-a Soci-sciencia Universitato, en la lernado partoprenis pli ol 1 000 homoj, inter kiuj 400 ricevis diplomon de mezgrada kurso: Antaŭ nelonge ili okazigis amuzan vesperon. Gvidantoj de la Esperanto-asocioj de la provinco kaj Kantono kaj respondeculoj de la radiostacioj partoprenis la amuzan vesperon. La televida stacio de la provinco kaj aliaj gazetaraj servoj raportis pri tio.

● En la komenco de novembro 1990, s-ro Jack Snarberg, prezidanto de la Esperanta Asocio de Jönköping de Svedio, faris tritaĝan komercan esploradon pri investa medio de Hainan-provinco. La loka perlokulturo multe interesis lin. Li asertis, ke perloj kulturataj en la provinco trovos bonan merkaton en Svedio.

● Lastatempe, la Centro pri Eduka Konsultigo de Guizhou-provinco okazigis Esperantan ekspozicion, en kiu eksponiĝis Esperantaj gazetoj, libroj, insignoj, poŝtkartoj kaj leteroj.

● En 1990, en iuj lokoj de Ĉinio oni funkciigis diversajn Esperanto-kursojn. Neimenggu-universitato en la urbo Hohhot unuafoje funkciigis Esperanto-kurson. Jam finiĝis la kvara Esperanto-kurso funkciigata kune de la Esperanto-asocioj de Jiangsu-provinco kaj la urbo Changzhou. En la Kultura Domo en Nanchang funkciis Esperanto-kurso por infanoj.

● Okaze de la 45-a datreveno de la fondiĝo de la Unuiĝintaj Nacioj, en la jaro 1990 Esperanto-Societo de Leskovac, en kunlaboro kun la Fervojistaj Esperantistaj Societoj el Vranje kaj Skopje de Jugoslavio, iniciatis subskribadon de la 9-a de majo ĝis la 24-a de oktobro 1990, kaj sendos la subskribojn al la Ĝenerala Kunveno de UN, por ke Esperanto havu lingvan egalrajtecon en sia instruado en ĉiuj elementaj kaj mezaj lernejoj en ĉiuj landoj de la tuta mondo. Samtempe la iniciatinto petas ĉiujn esperantistojn, societojn kaj asociojn de la mondo enviciĝi en planojn de siaj aktivecoj antaŭ la 24-a de oktobro 1991. Por detaloj vi turnu vin al Gvi-

danto de la akcio en Esperanta societo Leskovac Atanasije Marjanoviĉ, B. Nušića 27, 16000 Leskovac, Jugoslavio.

● Kadre de la propona programo de la Itala Esperanto-Federacio pri la temo "Esperanto-informado sur Strato" lanĉita al la italaj grupoj, la 27-an.11.1990 la Bolonja Esperanto-Grupo aranĝis en la plej granda placo de Bolognese grandan ekspozicion kun la panelskribaĵo titolita: "ESPERANTO, la komuna lingvo por Eŭropa Unuiĝo". Pluraj grupanoj disdonis al la preterpasantoj flugfoliojn kun la temo "1992, kia lingvo por Eŭropo?"

● Partoprenu Internaciajn Semajnojn en Francio. La unua okazos en vilaĝeto de la franca montaro Alpes, 1000 m super la mar-nivelo, 30 km sudoriente de Genevo, en mirinda ripoza loko, kadre de bela feriejo, de la 24-a ĝis la 31-a de aŭgusto 1991. La dua okazos ĉe la mediteranea marbordo, en la havenurbo Sete, 30 km okcidente de Montpellier, en bela parko apud la maro, de la 7-a ĝis la 14-a de septembro 1991. Oni povos lerni aŭ perfektigi sian lingvoscion en trinivelaj Esperanto-kursoj prizorgotaj de eminentaj instruistoj, vojaĝi tra Francio kaj viziti siajn korespondantojn. Adreso: Dr. Yvette Vierre, 5, rue du Docteur Roux, 34000 Montpellier, Francio.

"Esperanta informado sur strato" fare de Grupo Esperantista de Bolonjo, Italio



Membroj de la Esperanto-kurso de Shandong-universitato prezentas en Esperanto.



# *Hunan, loko konata, sed multe ŝanĝiginta*


Teksto de LU CHUANBIAO

Fotoj de LI CHUNGENG



Lokomotivo de tipo "Shaoshan 5", produktita de la Zhuzhou-a Fabriko de Elektraĵ Lokomotivoj. La povo de la lokomotivo estas 3 200 kilovattoj, kaj la maksimuma rapido estas 160 km. po horo.

En la krudlaminatejo de la Xiangtan-a Ŝtala Kompanio



**E**N mia infaneco mi vivis en suda Ĉinio kaj bone konis la tieajn pejzaĝon, produktadon kaj la popolan vivon. Poste mi lernis kaj laboris en norda Ĉinio. Je la fino de la pasinta jaro mi havis la ŝancon viziti plurajn urbojn de Hunan-provinco en suda Ĉinio. Ĉio, kion mi vidis kaj aŭdis, estis kaj konata kaj fremda por mi. Kaj mi ne plu kuraĝis nomi min "konanto de suda Ĉinio".

## UNU VIDO TAŬGAS PLI OL DEK AŬDOJ

En la dua tago post mia alveno al Changsha, la ĉefurbo de la provinco, mi intervjuis provincanon Xu Zhemin, vicestron de la provinca planiza komisiono. Li petis mian impreson pri Hunan kaj mi senkaŝe diris al li: "Mi portas ne tre bonan impreson pri ĝi."

Kiam mi estis lernanto, mi sciis de lernolibro, ke la naturdotita Hunan estas lando abunda je fiŝo kaj rizo. De longe cirkulas la diro, ke "Rizo de Hunan kaj Hubei sufiĉas por la tuta Ĉinio". La provinco, kiel lando de neferaj metaloj, havas antimonon, kies rezervokvanto okupas la unuan lokon en la mondo. Tamen, min profunde impresis, ke la favoraj naturaj kondiĉoj ne alportis feliĉon al la Hunan-a popolo. Kiam favoris la vetero, la popolo povis vivteni sin pli-malpli. Sed en magra jaro, oni ne povis ne migri aliloken por almozpeti. La aŭtarcia natura ekonomio, malfacila trafiko kaj izoliteco kaŭzis konservativecon kaj malmodernecon. Mi esperas, ke la provinco ŝanĝos sian fizionomion kaj forigos la postigintecon. Sed verdire, mi ne estis optimisma por tio.

"Necesas konfesi, ke ĉio, kion vi diris, estis faktoj, sed multaj faktoj jam fariĝis pasintaĵoj. Nun ni strebas al nova evoluo sur nova bazo." Li ne sentis skrupulon en interparolado pri la malmoderneco de la loko en la pasinteco. Li diris simple: "Unu vido taŭgas pli, ol dek aŭdoj. Vi mem rigardu la faktojn."

## SKRUPULO EN VENDADO DE OVOJ

En dubo mi unue veturis al Shaoshan. Supozeble parto de niaj legantoj scias, ke ĝi estas hejmloko de Mao Zedong, fondinto de la nova Ĉinio. Antaŭe la lokanoj fidele sekvis la politikojn de la ŝtato kaj la loko estis rigardata kiel solida bazo de tradiciaj revoluciaj pensoj. Kiaj ŝanĝiĝoj okazis en la loko, kiam Ĉinio komencis reformadon kaj pordomalfermon?

Nia aŭto venis al Shaoshan. Rigardante eksteren tra fenestro de la aŭto, mi vidis, ke antaŭ vilaĝo sterniĝas vasta kampo kaj malantaŭ ĝi ondas montĉenoj. La sunlumo karesis montojn kaj domojn, kio donis poezian etoson. Enirinte en la vilaĝon, mi surpriziĝis de la vidaĵo: Krom la bone konata domo iam loĝata de Mao Zedong, ĉio alia ŝanĝiĝis. Antaŭe oni venis viziti en bonaj vicoj gvidate de ruĝa flago, kaj nun, la en- kaj eksterlandaj vizitantoj venis por turismo. Apud la vojo al la domo viciĝis standoj. Oni konkurence ofertadis kokovojn, arakidojn, ludilojn, matojn, tonikajn kuracilojn, kosmetikaĵojn k.a. Sur la montodeklivo kontraŭ la domo funkcias 4-5 malgrandaj manĝejoj. Sur la tabulo de unu el la manĝejoj okulfrapis surskribo "Manĝejo de Familio Mao". Mastrino Tang Xiuying de la manĝejo estis kamparanino. Ankaŭ ŝiaj filinoj kaj bofiloj servas en la manĝejo.

Simile al eleganta vilao, la malantaŭa monto konsistas el longa valetoj kaj granda kaverno farita sur la montodeklivo. En la kaverno estis vasta kabineto, kunvenejo kaj dormoĉambro. Mao Zedong iam laboris en ĝi kaj faris gravajn decidojn por la ĉina revolucio. Antaŭe oni organizis nur kolektivajn vizitadon kaj faris edukadon pri revolucia tradicio, kaj nun la loko estis malfermita kiel turisma loko.

Antaŭe Shaoshan produktis nur rizon. En la 70-aj jaroj estis konstruita landfama irigacia kanalo en Shaoshan, tiel ke ĝi fariĝis la loko, kies rikolto estis garantiata tiel en

sekegeco kiel en troa pluvo. En la pasinteco en Shaoshan estis preskaŭ neniu industrio. Sed nun en ĝi rapide prosperiĝis la industrioj de tekstilado, konstrua materialo, manĝaĵo-prilaborado, ledaĵo, maŝinfabrikado kaj elektroniko. Tie estas 1 200 fabrikoj de diversaj skalaj. Ĝiaj produktaĵoj agrikulturaj kaj industriaj vendiĝas en Japanio, Usono, Sudano kaj aliaj pli ol dek landoj kaj regionoj. La jara produktovaloro de industrio superis 100 milionojn da juanoj, sesoble pli multe, ol tiu de 1978.

"Mi dirus al vi malkaŝe, ke antaŭ dekelkaj jaroj la ordinara sed ankaŭ eksterordinara Shaoshan-vilaĝo estis katenata de tradicia konservativismo. Ni sciis nur bone prilabori teron kaj servi kiel varmaj gastigantoj de la revolucia sanktejo, sed ne sciis fari reformon kaj pordomalfermon." Estro de Shaoshan-administracio Mao Shiwen diris al mi, ke tiam ĉiuj familioj havis superfluaĵojn, sed ili hontis vendi ovojn. La superfluaĵaj laborfortoj restis hejme kaj ne sciis serĉi laboron aliloke. En la komenco de reformado kaj pordomalfermo oni intencis sendi ilin por lerni teknikon de horloĝriparado, sed ili opiniis tion nehonesta."

Parolante pri la ŝanĝiĝo en la koncepto de shaoshan-anoj, li diris en emociiĝo: "Tamen ili vivas ne izolitaj. La reforma tajdo, kiu envolvis la ĉinan teron, senĉese sturmis Shaoshan. La sperto de Shenzhen kaj Xiamen pensigis la shaoshan-anojn: Kial ni hontas vendi eĉ ovojn, kiam aliloke oni strebas al profito? Kial superfluaĵaj laborfortoj ne serĉas laboron aliloke? Kial ni ne pruntas monon por konstrui fabrikon? Kial ni ne eksportas varojn, kiam oni importadas?"

"Tiuj demandoj spegulis ŝanĝiĝon de tradiciaj konceptoj, alivorte, turniĝon de la koncepto pri produktaja ekonomio al tiu pri vara ekonomio. Rezulte de tio aperis kapablaj specialigitaj familioj de agrikulturo, kamparanoj-entreprenistoj kaj estiĝis la nova



En produktado de marmoro



En la Fabriko de Plasta Tapeto de Loudi

Shaoshan.”

Mi dankis lin pro la vortoj. Ili heplis min bone koni kamparanojn de Shaoshan kaj la tuta provinco kaj la grandajn ŝanĝigojn en la loko.

## IRI SIAN PROPAN VOJON

Antaŭe oni laŭdis nur agrikulturon de Hunan, kaj neniam menciis ĝian industrion. Ŝajnis, ke ĝia riĉa rezervo de minoj devas resti eterne sub la tero kaj oni devas uzi metiaĵojn aŭ importaĵojn.

En la vojaĝo mi vidis, ke nun sub la favoraj naturaj kondiĉoj la agrikulturo de Hunan disvolviĝas rapide kaj stabile kaj la regiono Dongtinghu en la norda parto de la provinco ankoraŭ estas grava bazo de greno de Ĉinio. La produktokvanto de rizo kaj ramio okupas la unuan lokon en Ĉinio. La produktokvanto de teo kaj la nombro de porkoj okupas la duan lokon en la lando. Dank' al alta takso de pluapaŝa prilaborado de agrikulturaj kaj neagrikulturaj produktaĵoj, oni anstataŭigis primarajn kaj krudajn produktaĵojn per produktaĵoj post pluapaŝa prilaborado. Jam aperis la rudimenta formo de la vara ekonomio de agrikulturo.

Sed kompare al industrio, la agrikulturo disvolviĝis malrapide. Materialo de koncerna ekonomia departemento montras, ke en la pasintaj 40 jaroj post la fondiĝo de la nova Ĉinio, en Hunan aperis rudimenta industria sistemo el fera metalurgio, nefera metalo, tekstilado, ledajfarado, paperfarado, bezo-

naĵoj por kulturo, eduko kaj arto, kaj aliaj 8 industriaj fakoj. La produktovaloro de la ĉefaj industriaj fakoj de maŝino, manĝaĵo, kemiaĵo, tekstilado kaj metalurgio konsistigas tri kvaronojn de tiu de la provinco kaj formiĝis ekonomiaj regionoj interligitaj, sed tamen kun malsamaj funkcioj kaj trajtoj. Ili estas Changsha-Zhuzhou-Xiangtan-regiono kun nefera metalo, metalurgio, maŝinfarado, tekstilado kaj manĝajprilaborado multe superaj en la provinco; la ĉirkaŭlaga regiono kun agrikulturo, manĝajprilaborado, tekstilado kaj petrol-kemia industrio; Xiangnan-regiono kun nefera metalo, energio, konstrua materialo, forstumo, fruktoj, tabako kaj sukerkanoj; Xiangzhong-regiono kun energio kaj krudmaterialo kaj Xiangxi-regiono kun forstumo, frukto-kulturo kaj brutobredo.

“Tamen la bazaj ekipaĵoj, povo kaj nivelo de produktado de ĝiaj industrioj ne povas kompari sin kun tiuj de la ĉemaraj provincoj kaj urboj,” diris vicedestro Xiao de la Provinca Ekstera Ekonomia kaj Komerca Komisiono. En tiu cirkonstancaro okazis signifa diskuto pri pluapaŝa disvolviĝo de industrio en Hunan. Iuj opiniis, ke por rapidigi la disvolviĝon de industrio en Hunan necesas konstrui grandan nombron da fabrikoj kun avangardaj instalaĵoj kaj teknikoj kaj disvolvi poreksportajn entreprenojn en la provinco, kiel oni faris en novaj urboj ĉemaraj. Aliaj opiniis tion neefektivebla, ĉar la kondiĉoj de Hunan estas malsamaj

ol tiuj en Shenzhen, Zhuhai kaj Xiamen (Tiuj tri lokoj estas la plej fruaj specialaj ekonomiaj regionoj). Hunan ne havas sufiĉan monon por konstrui novajn fabrikojn, kaj krome, novaj fabrikoj ne povas doni profiton baldaŭ. Laŭ ilia opinio, oni devas utiligi ĉefe la ekzistantajn kondiĉojn, kiaj funkciantaj fabrikoj, posedata tekniko kaj laborfortoj, enkonduki alilandan kapitalon kaj fari teknikan renovigon al malnovaj entreprenoj por pli frue akiri profiton. Kiel rezulto, la lasta opinio estis vaste subtenata. Sekve de tio, leviĝis tra la provinco tajdo de industria konstruado kun teknika reformo al malnovaj entreprenoj kiel la ĉefa tasko.

En la pasintaj 10 jaroj oni enkondukis avangardajn teknikojn kaj instalaĵojn kaj reformis 538 entreprenojn, inter kiuj 400 estis finkonstruitaj kaj komencis produktadon. Dank' al tio, la skalo de produktado pligrandiĝis kaj la kvalito de produktaĵo plialtiĝis. 162 specoj da produktaĵoj de la provinco estis landnivele premiitaj kiel bonkvalitaĵoj antaŭ la fino de 1989.

Pli ol duono de la 30 entreprenoj vizititaj de mi en Hunan estas tre malnovaj. Ni prenu la Guoguang-an Porcelanajan Fabrikon de Liling kiel ekzemplon. Ĝi havas historion de pli ol 50 jaroj kaj disvolviĝis malrapide. Dank' al enkonduko de internacie modernaj ekipaĵoj, pliboniĝis la kvalito de porcelanaĵoj. Enkondukinte modernan teknikon kaj farinte ĉiuflan-

kan reformon, la Cigareda Fabriko de Changde posedis kompletigitajn instalaĵojn kun monda nivelo de la 80-aj jaroj, kiaj produktlinio de tabako-tranĉado, envolvado, pakumado kaj filtrilo-farado. La jara produktopovo de la fabriko atingas 700 000 kestojn da cigaredoj kaj la profito okupas la ĉiunuan lokon inter la entreprenoj de la provinco kaj la sesan lokon inter la cigaredaj entreprenoj de la tuta lando.



Mi informiĝis de Xiao, ke la provinco prenis 300 projektojn de la Lianyuan-a Ŝtala Fabriko, Xiangtan-a Tekstila kaj Tinktura Fabriko, Hunan-a Grupa Kompanio de Malgranda Dizelo kaj aliaj 291 entreprenoj kiel gravajn objektojn de reformado en la proksima estonteco. Samtempe ĝi elektis ankaŭ 100 entreprenojn por reformado per alilanda kapitalo. Komence de la kuranta jaro ĝi okazigis en Shenzhen kunvenon pri ekonomia kaj teknika kunlaboro kun la eksterlando. Vicestro Xiao diris: "Nia celo estas ĉesigi produkton de 300 specoj da produktaĵoj kaj komenci produkton de 3 300 novaj specoj da produktaĵoj en la venontaj 5 jaroj. Ni esperas, ke nia klopodo plej baldaŭ ŝanĝos la impreson de la socio pri la industrio de Hunan."

(Daŭrigota)



Brodilo importita de la Loudi-a Lavtuka Fabriko

Produkta linio de la Zhongyi-a Friduja Fabriko de Changsha









Kvalitoekzameno en la Liling-a Porcelanaĵa Fabriko

La nova turisma loko Boyue-groto



En la Xiangtan-a Kabla Fabriko



# Pomĝardenoj sur Alta Monto

Teksto de ZHENG ZHENJIE

Fotoj de XIE JUN

**E**STIS profunda aŭtuno, tamen la natura pejzaĝo ne sentigis al mi dezertecon, kiam mi veturis pro ofico en Lingbao-gubernio ĉe la limo de la provincoj Shanxi, Shaanxi kaj Henan. Estis rikoltataj kotonoj kaj batatoj, kaj tritikaj kampoj aspektis kiel verda tapiŝo. Oni kultivas forstojn kaj grenplantojn sur la ebenaĵoj en tiu ĉi gubernio. Rigardante foren, mi vidis vicon post vico da grandfoliaj paŭlovnioj, fruktoplenajn persimonojn kaj pomarbojn.

Kiam nia aŭto veturis sur monteĝon, alia pejzaĝo aperis antaŭ ni. Plejparto de la tieaj montoj apartenas al la majesta Xiaoshan-montaro, la orienten-tendiĝanta parto de Qinling-montaro, en formo de ventumilo. La okcidenta parto de Xiaoshan-montaro estas alta. Aparte okulfrapaj estas pomĝardenoj sur Sihe-monto en Xiaoshan-montaro. Loka kolego diris, ke la tieaj pomarboj kreskas sur montodeklivo 800-1 200 metrojn super la marnivelo. En la loko, kun areo de 800 hektaroj da pomĝardenoj, ĉiujare produktiĝas 15 milionoj da kilogramoj da pomoj. Tie estas la plej granda pomĝardeno sur alta monto de Ĉinio.

Kun konvena altitudo, jara meznombra temperaturo de 12°C, forta ultraviolo, granda diferenco de temperaturo en

tago kaj nokto, fekunda tero kaj sufiĉa pluvokvanto, la loko produktas pomojn freŝkolorajn, bongustajn, sukeroplenajn kaj putrimunajn. La ĝardenoj estas bazlokoj de bonkvalitaj pomoj por eksportaj. Tieaj pomoj vendiĝas ankaŭ en landoj kaj regionoj de orienta Eŭropo kaj sudorienta Azio, krom en iuj lokoj de Ĉinio.

Lokanoj diris al mi, ke sur Sihe-monto kultivas pomarbojn la Ŝtata Lingbao-a Pomĝardeno, fondita en 1956, kaj naturaj vilaĝoj sub Sihe-distrikto. Unue mi vizitis

la vilaĝon Yaoyuan.

Kiam ni trapaŝis pomĝardenon apud la ŝoseo, pomoj sur branĉoj frapetis kontraŭ niaj kapoj kaj ilia aromo tiklis la nazojn.

“La pomo Hongfushi estas freŝruĝa kaj milde dolĉa, kun karno delikata kaj flaveta. Tie produktiĝas ankaŭ la pomo Xinhongxing. Ili ambaŭ estas de bonaj rasoj enkondukitaj el Japanio kaj Usono,” la 72-jara hortikulturisto Liu Sangang diris al mi. “En mia familio estas ses membroj. Krom tritiko,

Riĉa rikolto de fruktoj



maizo kaj malmulte da legomoj, ni laŭkontrakte kultivas ankaŭ 600 pomarbojn. El vendado de pomoj ni ĉiujare enspezas ĉ. 20 000 juanojn, escepte de koncerna elspezo kaj imposto." Tion dirinte, li grimpis sur pomarbon, deprenis pomon pezan je 0.5 kilogramo kaj petis min gustumi ĝin. Tuj poste, li facile desaltis de sur la arbo.

Pro kio prosperas pomarboj sur Sihe-monto? Laŭ la opinio de Liu Sangang, tio dependas ĉefe de politiko kaj scienco. Post vizito de la vilaĝo Mowan, mi trovis, ke prave diris maljunulo Liu. En tiu vilaĝo nur unu familio apartenas al Lingbao-gubernio origine, kaj la aliaj migris tien pro malsato el aliaj provincoj kaj najbaraj gubernioj en la 50-aj kaj 60-aj jaroj. Tiam tie kreskis malmulte da arboj kaj eĉ ne funkciis ŝoseo. La lokanoj vivis mizeran vivon. Kvankam oni ekspluatis la Ŝtatan Linbao-an Pomĝardenon sur Sihe-monto, tamen laŭ la politiko preni gren-produktadon kiel la ĉefĉeneron, oni devis kultivi grenplantojn sur montodeklivoj. En la jaroj de riĉa rikolto ili povis plimalpli sin vivteni, kaj en la jaroj de magra rikolto multaj el ili povis vivi nur de monhelpo de la ŝtato. Ili loĝis en malnovaj kavernoj kaj kaba-

noj. Tial cirkulis la popolkanto:

*Malnovaj kavernoj,  
Kadukaj kavanoj,  
Ĉiam akompanas,  
La familianojn.*

Antaŭ dek jaroj, kiam la kampara reformo ekpraktikiĝis tra Siheshan-regiono, la lokanoj finis la historion de la nura kultivado de grenplantoj. Laŭ la loka natura medio, la diversnivelaj registaroj de la gubernio alvokis al la kamparanoj transplanti arbojn ĉie sur la supro de Sihe-monto, kultivi pomarbojn sur la montodeklivo kaj kreskigi tritikon, maizon k.a. ĉe la montpiedoj.

Dank'al la praktiko de laŭkontrakta laborsistemo de produktado kaj regiona ekspluatado laŭ geografia situo, granda ŝanĝiĝo okazis en Siheshan-regiono. Sun Ting, vilaĝano de Mowan, konigis al mi, ke antaŭ 1978 lia familio produktis nur grenon kaj la jara pokapa meznombra enspezo eĉ ne atingis 50 juanojn. En 1990 lia familio laŭkontrakte kultivis grenplantojn, 200 pomarbojn kaj aliajn arbojn. Nur en la somero ili rikoltis 2 000 kilogramojn da tritiko. Kun la enspezo el vendado de fruktoj kaj aliaj la familio enspe-

zis 15 000 juanojn. Liaj 6 familianoj loĝis en 9 novaj ĉambroj. Sur la mebloj metiĝis kolora televidilo kaj magnetofono. Antaŭ la kampara reformo eĉ en la guberniurbo de Lingbao estis malofte vidataj tiaj aparatoj.

Ankaŭ Yang Qinghei, estro de la distrikto Sihe, migris tien en la 60-aj jaroj. Li diris al mi, ke en la distrikto oni fondis ĝardenistikan stacion kaj eksperimentan stacion por helpi la hortikulturistojn bone kultivi fruktarbojn kaj enkonduki novajn rasojn. Krome, oni fondis ankaŭ ĝardenistikan lernejon en la distrikto. En ĉiuj vilaĝoj oni funkciigis teknikajn lernejojn. Ĉe la fino de 1990, en Sihe-distrikto ĉiu familio havis unu hortikulturiston. Kamparano Liu Tiansong, kvankam neklerigita, diligente lernis ĝardenistikon kaj posedis la vivkutimojn de pomaj fiinsektaj kaj la metodon ilin mortigi. Antaŭ nelonge li komencis okupiĝi pri la nova tekniko de konservado de pomoj en kaverno kaj gajnis patenton de la ŝtato.

Laborantoj de la Ŝtata Lingbao-a Pomĝardeno trejnas la hortikulturistojn de la proksimaj 4 vilaĝoj, liveras bonrasajn plantidojn, sterkojn kaj insekticidojn kaj aranĝas por ili vendadon kaj konservadon de pomoj. La pomĝardeno ricevas nur 12% el la enspezo de la hortikulturistoj, dum la resta parto apartenas al ili mem, kaj tio forte stimulas ilian aktivecon en kultivado de pomarboj.

La bazloko de pomoj sur Sihe-monto estas unu el la ĉefaj pomproduktejoj de Lingbao-gubernio. En la gubernio ĉiujare produktiĝas 200 milionoj da kilogramoj da fruktoj, inter kiuj duono estas pomoj. Yang Zenglou, direktoro de la Ĝenerala Fruktoprodukta Kompanio de la gubernio, ĝoje diris al mi, ke en la jaro 2000 la gubernio duobligos la produktokvanton de pomoj, jujuboj, persikoj, piroj, vinberoj, persimonoj kaj aliaj fruktoj. ■

Plukado de pomoj



# Sabloskulpturo


Ĉe ĉarma plaĝo ofte videblas knaboj, kiuj arope sidante tie, konstruas el sablo pagodon aŭ imagitan kastelon de Cindrulino. Ekster atendo, tia ludo estis riĉigita kaj fariĝis sabloskulpturo, bone konata arto.

Jam antaŭ longe naskiĝis primitiva sabloskulpturo. Oni diris, ke egiptoj eble faris el sablo modelon de piramido kaj Mikel-Anĝelo kaj Vinĉi reproduktis per sablo siajn skulptaĵojn. Laŭdire, en la komenco de la nuna jarcento pioniroj de la arto kreis unuajn tiajn verkojn ĉe bordo de usona lago. Fakte, la registrita historio de sabloskulpturo komenciĝis en 1969. En tiu somero aperis sur la plaĝo Lunlumo de suda Kalifornio de Usono granda sablofuorto peza je 90 tunoj.

Tia skulptaĵo estas farita el sablo, marakvo kaj emulsio per ŝovelilo, sitelo, kamiono, buldozo kaj pneŭmata martelo. Por fiksi sablon skulptantoj devas prepari lignajn framojn, ŝuti sablon en ilin kaj kompaktigi ĝin, antaŭ ol skulpti de supre malsupren.

La sabloskulptaĵo ekzistas maksimume kelke da semajnoj kaj tre baldaŭ detruigas de vento kaj tajdo. Artistoj proponas, ke tiaj skulptaĵoj estu naturaj kaj simplaj. Ili malprobas troan uzadon de emulsio. Laŭ ili, ĝuste la efemereco montras la ĉarmon de la arto. Kompreneble, nombro da artistoj emas uzi emulsion, por ke pli da homoj ĝuu la skulptaĵon.

Nun sabloskulptado estas enlistigita kiel sportobranĉo. Ĉiun aŭtunon okazas internacia sabloskulptura konkurso ĉe Xigongqing-golfo de Hongkong, kiun ofte partoprenas pli ol 60 teamoj el Hongkong, Aomen kaj Japanio. Tiam vidiĝas en la golfo granda spektaklo.





Ĉevalo



Piedoj

Patro kaj filo en sabloskulptado





Šuo

Drako



# “Legomkorboj” de Pekinanoj

Teksto de ZHENG ZHENJIE

Fotoj de LIU SIGONG

**A**NTAŬE, kiam venis vintro, aperis sur stratoj de Pekino longaj vicoj da homoj, kiuj atendis aĉeti ĉinajn brasikojn por rezervo, ĉar vintre estis ne nur malmultaj, sed ankaŭ karaj la tomatoj, kukumoj kaj aliaj legomoj kultiveblaj nur en forcejoj. La ĉinaj brasikoj vendataj kun ŝtata subvencio estis malkaraj, facile rezerveblaj, tial ili ĉiam estis la ĉefa legomo de pekinanoj tra vintro de pasintaj jaroj.

Antaŭ tri jaroj la brasika rikolto estis malabunda, nemalmultaj pekinanoj plendis kontraŭ la registaro pro malgranda porcio da brasikoj por vintra konsumado. En la sekvanta jaro la brasikoj havis abundan rikolton, la merkato liveris grandkvante bonkvalitajn brasikojn, sed ili jam ne interesis la pekinanojn. En la lasta jaro la vendado de brasikoj tute malvigligis. La brasikoj estis tiel multaj, ke la ŝtataj legomvendejoj devigis komunajn manĝejojn de oficejoj aĉeti laŭeble pli da brasikoj. Samtempe kun tio vidiĝis fenomeno, ke sur manĝotabloj de la pekinanoj aperas ĉiam pli multaj forcejaj legomoj. Ĉu en la grandaj ŝtataj legomvendejoj ĉu en la legombazaroj, ĉie vendiĝas tomatoj, florbrasikoj, melongenoj, kukumoj, kapsikoj, spinacoj, celerioj, kolzoj k. a. Iliaj prezoj estas tute akcepteblaj por ordinara pekinanoj.

75-jara Liu Wenru estas dommastrino kaj ofte aĉetas en Xidan legomvendejo. Ŝi diris al mi: “Antaŭe en vintro mia familio ofte manĝis ĉinan brasikon, rafanon kaj terpomon. Ĉijare mia familio

ne aĉetis ĉinajn brasikojn por rezervo. Nun legomoj estas multe pli abundaj ol en la pasinteco. Kie la legomoj estas bonaj, tien mi iras aĉeti.”

Kio prosperigis la legoman merkaton en vintro? Kun tiu demando mi vizitis la Pekinan Legoman Kompanion, vintran legomproduktejon en antaŭurbo kaj du pogrondajn legombazarojn en la urbo.

## EN VARMOBEDOJ

Respondeculo de la kompanio diris al mi, ke en la lastaj jaroj, laŭ la principo “preni proksiman antaŭurbon kiel ĉefan legombazon kaj malproksiman antaŭurbon kiel la helpan, aĉeti aliloke legomojn en neceso, por garantii sufiĉan liveron”, la kompanio elektis en proksima antaŭurbo iujn lokojn spertajn en legomkultivado kiel bazojn de vintraj legomoj.

Mi veturis al iu produkta bazloko de vintraj legomoj de Lugouqiao-subdistrikto en sudokcidenta antaŭurbo de Pekino, kiu kontraktis liveradon de legomoj al la Pekina Legoma Kompanio. En la 21 vilaĝoj de la subdistrikto ĉie vidiĝas blankaj forcejoj kaj varmobedoj kovritaj per plasta membrano. En iu bedo kun areo de 3 aroj juna kamparano Yue Shengxue kaj lia edzino diris al mi, ke ilia vilaĝo ĉiujare kultivas brasikojn laŭ la traktato kontraktita kun la legoma kompanio. La aĉeta prezo de la ŝtato en 1990 por 1 kg. da ĉina brasiko estis 0.14 juano, dum la ŝtato vendis al la urbanoj 1 kg. da brasiko kontraŭ 0.10 juano. Tio garantiis la enspe-

zon de la legomkulturantoj, ne peze ŝarĝis la urbanojn kaj stabiligis la prezon de legoma merkato. La aliaj legomoj, precipe delikataj legomoj kultivataj en varmobedoj, plejparte povas vendiĝi en legombazaroj, krom malgranda kvanto nepre vendata al la kompanio. Tio multe entuziasmigis la kamparanojn en kultivado de vintraj legomoj.

Yue Shengxue kultivas vintrajn legomojn laŭkontrakte en la bedo. Li rikoltis 6 000 kg. da kukumoj kaj tomatoj en la pasintaj vintro kaj printempo kaj akiris netan enspezon de 4 000 juanoj post dekkalkulo de produktokosto kaj agrikultura imposto.

En la varmo-bedoj mi trovis, ke nemalmultaj kamparanoj aplikis teknikon altefikan kaj energiosparan. En la pasinteco ĉiu aro da forcejo konsumis 5-6 tunojn da karbo. Ili reformis la forcejojn, elektis kolzon frostorezistan, plibonigis varmizolecon kaj aplikis longe uzeblan plastomembranon. Dank’ al tio legomoj povas bone kreski sen hejtado.

En iuj bedoj kaj forcejoj mi vidis verdajn florbrasikojn, difanajn foli-laktukojn, ĉerizajn rafanetojn, brasikojn, asparagojn, kolzojn kaj aliajn legomojn devenintajn el la Okcidenta Eŭropo, Norda Ameriko, Japanio kaj aliaj lokoj.

Por garantii legoman liveradon en legommanka sezono, la Pekina Legoma Kompanio kaj aliaj koncernaj institucioj asignis specialan monsumon por konstrui malalttemperaturajn staplojn kun areo de 100 000 kvadrataj metroj por

rezervi legomojn. La ajlaj flortigoj vintre vendataj en la ŝtataj legomvendejoj kaj bazaroj estas liverataj de tiuj staploj.

## STARIGI LEGOMBAZOJN EN ALIAJ LOKOJ

La legomoj kultivataj de antaŭurbaj kamparanoj en la forcejoj kaj varmo-bedoj sendube ne povas plenumi la bezonon de la urbo.

Ekde 1982, la kompanio sinsekve starigis legombazojn en iuj gubernioj de la nordaj Hebei- kaj Shanxi-provincoj, en kuna investado kun tiuj lokoj. Tiuj lokoj sen industria poluado situas en la transira regiono inter la Mongolia Altebenaĵo kaj Nord-Ĉinia Ebenajo, havas grandan temperaturan diferencon inter tago kaj nokto kaj abundan akvon, tial ili estas tre taŭgaj por kultivi tomatojn, kukumojn, kapsikojn, kapobrasikojn, celeriojn kaj aliajn, kies kultivado kaj rikoltado estas pli malfruaj ĉirkaŭ unu monaton ol en Pekino. Kiam la kamparanoj de tiuj lokoj rikoltas tiujn legomojn, ĝuste mankas legomoj en Pekino. Krome, la distanco ne estas longa, la rikoltitaj legomoj povas atingi Pekinon en la sama tago. Statistiko raportas, ke tiuj lokoj ĉiujare liveras al Pekino 50 000 tunojn da bonkvalitaj legomoj.

Krome, la kompanio sendas aĉeti legomojn en aliaj lokoj. Nur Pekino ĉiutage enportas meznombre 2 500 tunojn da legomoj de aliaj lokoj por sia bezono.

## LA PLEJ GRANDAJ "LEGOMKORBOJ" DE PEKINO

La Pekina Legoma Kompanio



Legomstando sur strato

kaj aliaj koncernaj institucioj fondis 13 pograndaĵajn bazarojn en la urbo de Pekino, kiuj formis bonordajn legomkomercajn centrojn, kiuj portas al la urbanoj grandan oportunon kaj realigis ĝeneralan reguligon de la ŝtato super la legoma merkato.


En la Hepingli-a Pogranda Legombazo sub la kompanio, mi vidis 200-metran fervojan kajon speciale por malŝarĝado de legomvagonoj. Ĉiutage ĉ. 5-10 vagonoj da legomoj estas alportitaj de alilokaj ŝtataj legomaj kompanioj kaj individuaj komercistoj.

Direktoro Zhang Qin de la bazaro diris al mi, ke en 1990 la bazaro pogrande vendis 17 500 tunojn da legomoj kaj 700 tunojn da fruktoj. En la antaŭtagmezo, kiam mi vizitis la bazaron, oni jam plenumis negocon de 150 tunoj da kapsikoj, kukumoj, lentoj kaj florbrosikoj el la malproksimaj provincoj Guangdong, Fujian, Yunnan kaj Sichuan.


He Dequan, ĝenerala direktoro de la Jingzhong-a Pogranda Bazaro de Agrikulturaĵoj en la nordokcidenta antaŭurbo de Pekino, diris al mi, ke ĉiutage lia bazaro pogrande vendas 400 tunojn da legomoj. Pro tio ĝi estas laŭdata kiel la plej granda "legomkorbo" de Pekino.

La nomita bazaro estis fondita de 14 junaj kamparanoj kun meznombre aĝo de 24 jaroj. Antaŭ kvin jaroj, kiam ili komencis fondi la bazaron, tage ili veturigis triciklojn tra la urbo por oferti legomojn kaj nokte He Dequan kaj liaj kamaradoj falĉis herbojn, formovis ŝtonojn kaj plenigis kavojn por pretigi areon de bazaro. Nun ilia bazaro havis komercan rilaton kun pli ol 600 legomvendantoj en aliaj provincoj. Ĝis la fino de 1990 la bazaro plenumis negocojn de 392 000 tunoj da legomoj kaj fruktoj, en valoro de 318 000 000 jvanoj.


Baldaŭ estis tagmezo, sed la bazaro kun areo de 25 000 kvadrataj metroj ankoraŭ estis plenplena de kamionoj, remorkoj de traktoroj kaj tricikloj plenŝarĝitaj de legomoj kaj fruktoj. Virinoj iradis inter la vicoj da podetalaj budoj. Post nelonge ili jam finis aĉetadon kaj foriris en kontento. Sudokcidente en la bazaro, mi vidis kelkajn komizojn de ŝtata legomvendejo ŝarĝantaj kamionon per kapsikoj, kukumoj kaj tomatoj. Maljunulo veninta aĉeti legomojn diris al mi: "Ni estis maltrankvilaj, ke legomaj prezoj leviĝos antaŭ la Printempa Festo. Nun ni trankviliĝis vidante, ke legomoj estas abundaj kaj la prezoj stabilaj." ■



Legom-bazaro en vintro



Frukto-standoj sur strato



Legom-standoj

Pogranda legombazaro








La loko ne konas vintron.



# Kosmeti- ka Lerne- jo Monita

Fotoj de CAI HAIFENG




Instruisto el Hongkong donas lecionon.

La nomita lernejo estas profesia lernejo de Ĉinio por kulturaj speciale kosmetikistoj kaj ŝminkistoj.

La lernotempo daŭras tri jarojn. Krom

fakaj scioj, la lernantoj devas lerni ankaŭ lecionojn por ordinaraj mezlernejoj. Antaŭ ol ricevi diplomon, ili devas esti rigore ekzamenitaj per profesia praktiko. Plejpar-

En praktiko





Instruistino donas ekzemplon.

En kosmetika leciono

to de la 200 diplomitoj de la lernejo laboras en hoteloj de Pekino. Iuj el la diplomitoj mem starigis barbirejon aŭ salonon de beligado.

Lernantoj en praktiko



## MODERNAJ VESTOJ

Foto de CAI HAIFENG

Fotoj de CAI HAIFENG

### Ŝaflana Mantelrobo kaj Ŝalo

La vesto estas projektita de Shu Hong, kiu laboras en la Erdosa Fabriko de Ŝaflana Svetero en la Interna Mongolio, Ĉinio. Ĝi karakteriziĝas ne nur per eleganteco kaj lukseco de la Oriento, sed ankaŭ per romantikeco de la Okcidento.



# Akompanistinoj de maljunuloj en Ŝanhajo

**E**N Ŝanhajo, kie loĝas 12 milionoj da homoj kaj maljunuloj konsistigas pli kaj pli multajn procentojn, leviĝas nerimarkite nova okupo — akompanado de maljunuloj en postlaboraj horoj. Plejparto de la akompanistinoj estas 20-30-jaraj junulinoj.

En landoj kun perfekta socia servo tiu okupo certe ne estas sensacia, sed en Ŝanhajo ĝi vekis diskuton. Iuj rigardas ilin anĝeloj, aliaj rigardas ilin nur altklasaj servistinoj, kaj triaj sentas maltrankvilon, ke la akompanistinoj kaŭzas malakordojn en la familioj de la dungantoj. Kiel vi opinias pri tiu okupo? Jenaj tri rakontoj helpos vin fari propran konkludon.

## RAKONTO DE OFICISTINO A

Mi fariĝis akompanistino tute hazarde. Iun tagon mi estis mallaŭte voĉleganta "La Ruĝa kaj la Nigra" de Stendhal sidante sur benko en parko. Min aŭskultis apudsidanta maljunulino. Mi absorbiĝis en legado kaj ĉesis legi ĉe la falo de la vesperkrepusko. Mi leviĝis kaj trovis, ke la maljunulino ankoraŭ dronis en la romano. Ŝi petegis min: "Tre bone vi legis! Ĉu vi povus daŭrigi la legadon en mia hejmo kontraŭ rekompenco?" Mi hezitis kaj tamen konsentis. Mi legis por ŝi 2-3-foje ĉiusemajne, po unu horo kaj por ĉiu horo ŝi pagis al mi 5 juanojn. Ŝi tre ŝatis mondfamajn verkojn, kaj mi legis por ŝi "La Ruĝa kaj la Nigra", "La Traviata", "Anna Karenina"... Poste ŝi malsaniĝis

kaj mi ĉesis viziti ŝin. Iun tagon ŝia nepo telefonis al mi, ke mi tuj iru al lia avino kun "Jane Eyre", kies kelkaj paĝoj restis nelegitaj. Kiam mi atingis ŝin, mi trovis, ke ŝi agonias pro kancero. Ŝi ripetade murmuris mian nomon. Vidinte min, ŝiaj familianoj tuj laŭte anoncis al ŝi mian alvenon. Ŝi malrapide malfermis la okulojn, fiksita la rigardon sur mi kaj diris malcontinue: "Bonvolu... finlegi... mi aŭskultas..."

## RAKONTO DE STUDENTINO C

Mi akompanis eminentan intelektulon, kies vivkondiĉoj estis tre bonaj. Rekomendinto informis min, ke li volas akompanistino de literatura fako kaj ŝi devas porti lin per rulseĝo en parkon en dimanĉo por sunumado, ĝuo de pejzaĝo kaj babilo. Mi atingis lin en difinita horo, kaj li jam estis en la rulseĝo. Li estis tre ĝentila erudito. Ĉe la unua renkontiĝo li impresis min kiel mentoro. Li ĝoje diris, ke realiĝis lia multjara deziro havi junan amikon, kiu ŝatas literaturon, historion kaj filozofion.

Ofta renkontiĝo kaj interkompreno faris min kaj la maljunulon tre intimaj amikoj. Mi multe lernis de lia alta klereco. Sed samtempe mi rimarkis, ke li kaj liaj infanoj vivas ne harmonie. Ties bonvenigo al mi ĉe la komenco fariĝis malkontento. Timante estiĝi konflikton en lia familio, mi aludis al li mian intencon ĉesi viziti lin. Li diris kun vespiro: "Esence ekzistas en nia familio ne malakordo, sed nur manko de ko-

muna intereso. Ni ĉiuj okupiĝas pri propra afero kaj mankas al ni spirita interŝanĝo." Li aldonis sincere: "Ne pensu, ke mi pagas al vi multe. Estas por mi ja granda plezuro, ke iu aŭskultas mian parolon. Vi aŭskultas kaj komprenas min, ke mi ne plu sentas min soleca kaj senutila. Bonvolu resti ĉe mi!" Mi komprenis lin kaj decidis daŭrigi la akompanadon spite la embarason.

Duonjaron post tio forpasis la maljunulo. Advokato alvokis min al proklamo de la testamento de la maljunulo. Ĉi tiu skribis en la testamento: "Ĉar miaj gefiloj kaj nepoj okupas sin pri naturaj sciencoj kaj inĝenierio, mi decidis donaci al fraŭlino C miajn trimil librojn literaturajn, historiajn kaj filozofiajn." Mi estis surprizita kaj nenion povis diri dum longa tempo.

## RAKONTO DE INFANĜARDENISTINO E

Mi akompanis solecan maljunulon, kiu multe suferis dum sia vivo, sed akiris en sia maljuneco grandan sumon da mono. Liaj malfeliĉaj travivaĵoj vekis mian simpatian kaj mi multe laboris por gajigi lian vivon. Iom post iom mi fariĝis lia apogilo en la spirito. Li multe salajris min, por ke mi akompanu lin 3-4 fojojn ĉiusemajne. Lia hejmo preskaŭ fariĝis mia dua oficejo. Sed iun tagon mi renkontis lian erotikan rigardon kaj tuj komprenis tion dank' al la sensiveco de virino. Mi sugestis al li kaj leviĝis por foriri, sed li prezentis al mi stakon da mono postulante amaron. Mi forkuris en kolerego. Mi akompanis poste neniun maljunulon. ■

# Brika skulpturo de Hezhou

Teksto de LAN SHAN

Fotoj de LI QIANG

**L**A brika skulpturo estas aplikata ĉefe por beligi konstruaĵojn.

En pluraj lokoj de Ĉinio troveblas tiu arto de originala stilo. En la Linxia-a Huj-nacieca Aŭtonoma Subprovinco de Gansu-provinco la brika skulpturo estas populara. Ĉar Linxia nomiĝis Hezhou en la antikveco, tial la brika skulpturo estas nomata tiu de Hezhou.

La brika skulpturo de Hezhou naskiĝis en la 10-a jc. Plejparto de la metiistoj estas huj-nacianoj.

La brika skulpturo de Hezhou havas du specojn: La modlita kaj la skulptita.

La unua estas farita tiamaniere: fari el argilo drakon, birdojn, bestojn kaj florojn kaj baki ilin en forno. La skulptaĵoj estas tridimensiaj aŭ ebenaj.

La dua estas farita laŭ alia maniero: gravuri bildojn sur bluaj brikoj per ĉizilo kaj aliaj instrumentoj, sola briko povas esti artaĵo aŭ multaj skulptitaj brikoj konsistigas unu bildon. Ili plejparte estas ebenaj.

Tiaj brikoj antaŭe estis uzataj kiel ornamaĵoj sur konstruaĵoj de ŝtataj oficejoj, temploj, loĝejoj de grandsinjoroj aŭ iuj ordinaruloj. La skulptitaj brikoj estis uzataj ankaŭ sur ekranmuroj. Nun en la urbo Linxia vidiĝas ne nur novaj brikaj skulptaĵoj, sed ankaŭ tiaj artaĵoj produktitaj antaŭ dekoj kaj eĉ centoj da jaroj. Sur ekranmuro en moskeo de la urbo vidiĝas ortangula bildo el skulptitaj brikoj. En la bildo drako flugas en nuboj. Oni diris, ke ĝi estis farita antaŭ 400 jaroj.

Brikaj skulptaĵoj sur soklo de pagodo





Ornamaĵo por alero

En Dagongbei-moskeo, Hongyuan-gardeno kaj la Orienta Domo vidiĝas multaj brikaj skulptaĵoj faritaj de huj-naciaj talentuloj.

La Orienta Domo estis loĝejo de militaristo en la malnova Ĉinio.

Sur la ekranmuro en la korto vidiĝas pejzaĝo: brilas la suno, ŝvebas nuboj, en rivero kuŝas insuleto ombrata de pinoj kaj cipresoj. En la arbaro kaŭras domoj. Paro da grandegaj florzavoj kun peonioj staras ambaŭflanke de la pordo kaj

meze de la pordo estas fruktoplana vinberujo.

Sur alia ekranmuro brilas la luno, prosperas maljunaj pinoj, kuregas klara fonto kaj bonodoras diversaj floroj. La bildo enkorpigas tre faman version:

*Brila luno super pinoj lumas,  
Klara fonto inter rokoj lirlas.*

Sur ambaŭflankaj muroj de la suda muro en la ĉefa korto vidiĝas inkrustitaj brikaj peonioj kaj lotus-floroj.


La 3-etaĝa brika-ligna domo estas ĉefa konstruaĵo de la domo. Tie estas multaj brikaj skulptaĵoj montrantaj naturajn pejzaĝojn de Linxia, ideojn de antikvaj poemoj kaj pentraĵoj, riĉaj je romantika koloro kaj temperamento, aspirojn de la artmetiistoj al la ideala vivo.

La brikaj skulptaĵoj sur konstruaĵoj de Linxia montras la eminentan arton de tiu regiono. Ili estas grava konsistiga parto de la popola brika skulpturo de Ĉinio. ■

Brikaj skulptaĵoj sur la portalo kaj flankmuroj de Dagongbei-moskeo



La pordo de la Orienta Domo



# Printempo ĉe pramejo

## (NOVELO)

### I.

LA pramsipo haltis ĉe la kajo.

La rivero estis tre larĝa. La akvo abunda kaj kvieta, kvazaŭ ĝi ne fluus.

La ŝipo estis plena de homoj, plejparte ĵus foririntaj de la deĵoro. La maljunaj preferis sidi en la kajuto, dum la junaj ŝatis resti sur la ferdeko kune kun siaj bicikloj. Zefiro karesis ilin per agrabla malvarmeto.

La ŝipo ankoraŭ ne moviĝis. Interparolado de la pasaĝeroj zumadis sur la ferdeko, kio kontrastigis la kvietecon ĉe la pramejo.

Finfine eksonis sireno. Al la ŝipo haste kuris kelke da homoj. Kiam ŝipistoj malligis la ŝipon, la

alkurantoj piedbrue surpaŝis sur la kajfloson kaj enŝipiĝis en anhelo.

La lasta alvenanto estis Xiaoyun. Ŝi estis maldika, svelta. Sur ŝia blanka ĉarma vizaĝo facile videblis mildeco.

Kiam ŝi surpaŝis sur la ŝipon, la ŝipo jam ekmoviĝis, ke ŝi perdis ekvilibron. Iu etendis manon por helpi ŝin, sed ŝi fordankis kaj sukcesis teni sin en ekvilibro.

Tiu estis junulo. Ŝi ne pririgardis lin. Ŝajne li estis fortika kun okuloj, nazo kaj buŝo simetrie lokitaj sur la vizaĝo. Lia tuta korpo elspiris varmon.

Sed Xiaoyun ne rigardis al li. Ŝi rigardis supren al la ĉielo.

La subiranta suno ruĝigis la nu-

bojn, kaj la rivero reflektis la ebriigan ruĝon.

Xiaoyun la unua surbordiĝis, kiam la tremanta ŝipo apenaŭ haltis ĉe la transa kajo. Ŝi iris rekte antaŭen, sen returni la kapon, kvazaŭ ŝin persekutus monstro.

En la sekvanta tago ripetiĝis la sama okazaĵo.

En la tria tago ŝi penis havigi al si kuraĝon ĵeti rigardon al la junulo. Ŝia rigardo renkontis rigardon pian kaj ĝojan. Ŝi ekscitiĝis, kvazaŭ en ŝian koron ŝtormus vasta akvo. Guste en tiu ĉi momento ŝi konsciis, ke li venis nur pro ŝi. Ĉe tio ŝi ruĝiĝis kaj serioziĝis. "Malŝatinda!" ŝi insultis en si.

En la kvara tago li ne venis.

Ĉu li vere ne venis? Ĉu li ne kaŝis sin ie en angulo sur la ŝipo? Kiam ŝi konstatis, ke li ne venis, ŝi sentis sin facila.

Tiele pasis kelke da tagoj.

En enueco ŝi turnis siajn okulojn al mutulino staranta aliflanke de la ferdeko. La mutulino loĝis en la sama strato sur la okcidenta bordo de la rivero.

Apud la mutulino staris blindulo Erwang.

Ŝi vidis, ke la mieno de la mutulino estas kvieta, dum la vizaĝo de la blindulo purpuras kiel porka hepato. Ankaŭ ili silentis.

Ŝi pensis, ke la mutulino estas lerta en mimiko. Sed la blindulo ne povis vidi ŝian mimadon. Kaj ankaŭ ŝi ne povis aŭdi lian parolon. Do kiel la blinda Erwang enŝipiĝis? Ĉu la mutulino helpis lin?

Kiam ŝia pensado vagadis, la ŝipo albordiĝis. Ĉi-foje Xiaoyun postrestis sur la ŝipo por observi la mutulinon. Ŝi vidis, ke la mutulino subtenis Erwang sub lia brako kaj





firme apogis sin al li. Tiam ŝi sentis malagrablan solecon, kaj gape rigardis la riveron. En akvo ŝia svelta figuro moviĝadis kaj fariĝis malklara. Kiam novaj pasaĝeroj torentis sur la ŝipon, ŝi vekigis el iluzio kaj haste saltis sur la kajfloson por reveni hejmen.

Post tio ŝi tre volis revidi la junulon, sed li ne aperis. Ĉiufoje, kiam ŝi venis al la pramejo, ŝi sentis, ke io perdiĝis ĉe ŝi. La pia rigardo de la junulo diris al ŝi, ke li ne estas loĝanto en la strato okcidente de la rivero. Ŝi atentis la loĝantojn de la strato, sed ŝi neniam revidis la junulon. Ŝi ekkomprenis, ke li venis al la pramejo speciale por interkonatiĝi kun ŝi. Ŝi plendis kontraŭ la ĉagrena figuro, kiu longe turmentis ŝin.

La ŝipo tremante atingis la mezon de la rivero.

Subite la mutulino tuŝetis ŝin. Evidente ŝi volis tiri ŝin el la turmento de sopiro. Ŝi tute komprenis la mimikon de la mutulino kaj nur skuis la kapon kun amara rideto.

Tiun tagon ŝi denove dronis en meditado. Ŝi kvazaŭ vidis, ke la rivero glaciigis. Ŝi aŭdis krakadon de rompiĝo de glacio. Baldaŭ venis la sezono de degelado de glacio, kaj en la mezo de la rivero jam videblis fluo. Giganta glacibloko baraktis en la fluo kaj sur la glacibloko staris la junulo. La glacibloko preterpasis ŝin kaj direktis sin rekte al la golfo. Ŝi ekkriis de timo kaj maltrankvilego...

Subite la mutulino pugnis ŝin. Ŝi rekonsciigis el la koŝmaro kaj vidis la kvietan riveron.

Ĉi-foje la mutulino surpaŝis sur la pramŝipon kun bebo en la brakoj. Ŝin strikte sekvis Erwang. Xiaoyun tre enviis la feliĉajn geedzojn kaj ofte proksimiĝis al ili por vidi la dikan bebon. La mieno de Erwang ĉiam radiis de feliĉa ĝojo. Kelkfoje la mutulino demandis Xiaoyun pri la junulo, kaj sur la vizaĝo de Xiaoyun larmoj fluis kiel rivero.

## II.

Kelkfoje Xiaoyun malfruiĝis al pramŝipo kaj devis transriveri per var-pramŝipo.

La var-pramŝipo estis granda. Aŭtoj viciĝis sur la pramo, dum la pasaĝeroj staris inter la aŭtoj. Xiaoyun staris tie kun afliktiĝo en la koro. Kelkaj ŝoforoj elaŭtiĝis kaj staris sur la ferdeko por ĝui malvarmeton. Subite konata vizaĝo ekbrilis antaŭ ŝi, kio surprizis ŝin.

“Ĉu estas li?”

Ŝia sensivo diris al ŝi, ke tiu estas li.

Antaŭ tri jaroj li ekscitis ŝian amon. Nun la hazarda renkontiĝo tiel ĝojigis ŝin, ke ŝi senhezite sin puŝis al li.

“Hola!” ŝi mallaŭte vokis lin.

La juna ŝoforo mire sin turnis al ŝi.

“Ĉu... ĉu vi ne rekonas min?” ŝi demandis.

La ŝoforo cerbumis por rememori kaj post longe diris: “Ha, jes, eble... jes, mi rememoris.” Li diris gentile kaj ridetis facile.

Xiaoyun sentis, ke malvarmo blovis sur ŝian koron.

“En tiu jaro...”

“Ah, mi rememoris,” fine li montris malfortan entuziasmon.

“Ĉu ni interparolu en la aŭto?”

Xiaoyun kapjesis kaj ili sidiĝis en la stirejon.

“Tiun jaron mi estis senlabora kaj ĉie vagadis, kaj hazarde renkontis vin...” la ŝoforo diris.

“Sed kion vi faris poste?”

“Poste mi fariĝis ŝoforo kaj ĉiutage transriveris por transporti karbon.”

“Ĉiutage?”

“Jes, ĉiutage.”

“Do kial vi ne iris renkontiĝi kun mi?”

“...”

Xiaoyun sentis vertiĝon kaj multe penis por sin kvietigi.

“Vi forĝesis min!” Ŝi murmure plendis post kelke da tempo.

“Kio? Vi ne forĝesis min?” la ŝoforo mire diris.

“Bedaŭrinde...”

“Nu, kio bedaŭrinda?”

“La sorto tiele destinis,” ŝi suspiris.

La pramo, tangetanta, atingis la mezon de la rivero.

Paliĝis ŝia vizaĝo. Ŝia koro tre-

metis kiel la pramo. Ŝi devis ĝoji, ke ŝi hazarde revidis lin post longa sopiro. Sed ŝi sentis ĉagreniĝon. La apatio de la ŝoforo afliktis ŝin, lar-  
moj enŝteliĝis en ŝiajn okulojn.

“Hodiaŭ mi riparos mian kulpon, ĉu bone?” post momento la ŝoforo diris humile.

“Kion tio sugestas?”

“Poste ni ĉiutage kune transriveru... konsentu.”

Ŝi longe rigardis la bordon kaj ne povis respondi.

En la sekvanta tago la ŝoforo denove forlasis la stirejon kaj restis sur la ferdeko, kiel li tion faris en la pasintaj tagoj. La juna ŝoforo rigardis ĉirkaŭen kaj senzorge alparolis aliajn ŝoforojn. Kiam li reiris al sia aŭto, li vidis, ke Xiaoyun estas sidanta en la stirejo. Li rapide sin ŝovis en la stirejon kaj demandis ŝin tenante ŝian manon: “Vi jam venis?”

Ŝi diris nenion. Subite la ŝoforo ekscitiĝis, kaptis ŝin je la ŝultroj kaj brakumis ŝin.

Ŝi apatie toleris lian kareson. Ŝi aŭdis lian murmuron: “Mi devas fari pliafojan veturigon por kapti pli da mono.” Aŭskultante lian murmuron, ŝi sentis, ke kvazaŭ nebulo leviĝis en la koro. Subite ŝi ekpensis pri la mutulino kaj blindulo. Foje en konfuziĝo ŝi iris konsulti la mutulinon: “Ĉu vi sentas vin feliĉa?” La mutulino kapjesis, sed tuj poste kapskuis, tre serioze. Ĉi-momente Xiaoyun ne povis certigi, ĉu ŝi mem estas feliĉa aŭ simila al la mutulino. En la sino de la viro ŝi sentis varmon, sed ŝi ne povis forpeli malvarmeton en la koro.

La pramo silente iris sub la printempa suno. Ĝi penadis por atingi la transan bordon.

Estis la tria tago. Zefiro karesis kiel antaŭe. Interparolado daŭre zumadis sur la pramo. Ŝi tamen ne venis. ■

\* Juna verkistino el la urbo Fushun de Liaoning-provinco. Ŝia verkado komenciĝis en ŝia aĝo de 18 jaroj. “Popola Literaturo” kaj iuj aliaj gazetoj publikigis ŝiajn plurajn novelojn pri la vivo de la malforta sekso.

# Mi amas printempon

**C**IUJ sezonoj de la jaro havas sian propran belecon. En printempo allogas floroj kaj arboj kun

foliaroj de freŝa verdo; en somero ombras arboj kaj grasas



herboj; en aŭtuno ruĝas aceroj kaj aromas krizantemoj; kaj en vintro la tero vestiĝas per blanka neĝo. Sed mi plej amas printempon.

Matene, la suno etendis la varmajn brakojn kaj milde vekis la teron el sonĝo. Ĝi ĵetis oran lumon sur la teron. En la antaŭurbo mi ĝuis la printempan pejzaĝon vivecplenan. Birdetoj ĝoje kantis super mia kapo, kaj la arboj salutis min, svingante branĉetojn kun junaj folioj. Agrabla venteto kisis mian vizaĝon kaj karesis freŝajn vergojn de plorsalikoj. Ho, ĉio sur la tero vekigis kaj konkure ŝanĝis siajn vestojn.

Tagmeze, la suno pendis super la kapo. Ĉie sur la kvietaj kamparo aŭdiĝis mallaŭta susurado. Herbetoj, arbidoj kaj

freŝaj floroj interparolis kun la agrabla vento. Kiel lertaj teksistinoj, la herbetoj teksis verdajn tapiŝojn. La poploj, ĵus vekiginte el vintra dormado, disetendis siajn branĉojn plenajn de vilaj folietoj.

Vespere, la suno kliniĝis al la okcidenta horizonto kaj la ora vesperruĝo akompanis ĝin. La tero estis tegita de ora koloro.

Subite mian rigardon altiris al si malgrandaj ruĝaj punktoj. Mi iris al la punktoj kaj trovis, ke ili estas ruĝaj floroj disvolviĝontaj inter verdaj foliaroj. La butonoj estis plenaj, kvazaŭ ili disvolviĝus post unu nokto. Proksime de ili kreskis aro da vintraj jasmenoj kun branĉoj plenplenaj de orflavaj floroj. Hirundoj flugadis alte en la aero. Mi venis sub magnolion. Ĝiaj neĝe blankaj floroj staris rekte sur la branĉoj. En la lumo de la subiranta suno la floroj aspektis pli graciaj kaj pli puraj. Mi profunde enspiris la freŝan aeron de printempo kaj ebriiĝis de la printempa beleco.

Ho, la printempo revivigis la teron, alportis al mi ĝojon kaj esperon kaj kuraĝigis min strebi antaŭen. Mi volis fariĝi herbeto aŭ floreto por aldoni al la tero pli da beleco en printempo. ■

## KORESPONDI DEZIRAS

\* 28-j. komputeristo dez. kor. tm. pri ĉt. kun samideanoj inkl. fraŭlinoj, interesiĝas pri turismo, ĉinarto, pentrado, lingvo, Qigong kaj interŝ. bk., gvidilojn. Adr.: Xu Jiazhao, Taizhou Dianye Ju, Linhai, Zhejiang, 317000, Ĉinio.

\* Nur kun seriozaj, prirespondaj kaj al-Ĉinio-vojaĝontaj samideanoj el Koreio, Japanio, Pollando, Nederlando, Kanado, Brazilo, Afriko kaj Azio pri turismo, literaturo, ĉiutaga vivo, pensinterŝan-

ĝado. Adr.: s-ro Xiong Linping, Yinshi Fuwu Gongsi, Xinyu, Jiangxi, 336500 Ĉinio.

\* Kursaninoj de Vilnius-a E-Klubo dez. kor. tm. Inter ili: Lernantinoj /13-16-j./, studentinoj /19-20-j./ inĝenierinoj /23-j./, kuracistino /47-j./, grimistino /48-j./ Ŝatataj temoj: popolkutimoj, muziko, psikologio, literaturo. Hobioj: bildkartoj, fotografado, pentrado. Celoj: interŝanĝo de literaturo, konatiĝo, reciprokaj vizitoj. Unuan leteron skribu al: Vilnius-a EK, a.d. 178, SU-232000

Vilnius, Litovio, Sovetunio. Indikante profesion, aĝon kaj aliajn kondiĉojn de la korespondantino.

\* Klabonska Maigorata, 14-j. lernantino, dez. kor. tm. Adr.: Zychlin 1, 63-324 Kucrkow, woj Kalisz, Pollando.

\* Atenton! En Esperantujo komenciĝas aldonado de unika presaĵo "Familio Internacia", kiu helpas al esperantistoj krei internacian E-familion. Informon petu ĉe: Geesperantista Servo Geedziga, Kesto 175, Postamt, SU-220050, Minsk, USSR.

Ĉinaj proverboj

Maldolĉa pilolo kuracas la  
malsanon,  
Sincera admono utilas al  
konduito.

Netiminda malordo,  
Timinda senenketo.

Pli bele ornami la kapon per  
unu floro,

Ol fari la samon per multaj  
floroj.

Beleco ne en aspekto, sed en  
animo.

Mateno kara kiel oro,  
Printempo plej grava en  
jaro,

Kaj rikoltiga penlaboro.

Ĉina enciklopedieto

En Shang-dinastio (ĉ. 16-a - 11-a jc. a.K.) en Ĉinio jam funkciis poŝtstacioj transportantaj informojn. En la postaj dinastioj la poŝtstacioj estis plibonigitaj. Sed antaŭ Ming-dinastio (1368-1644) ili estis destinitaj nur por transporti dokumentojn kaj militajn informojn al registaroj. En 1403-1424 fondiĝis civila buroo de komunikado, la plej frua poŝtoficejo en Ĉinio.

Humuraĵoj

Redakcio petis faman astronauton: "Bonvolu tuj verki artikolon sub la titolo 'Ĉu ekzistas vivuloj sur la Marso?' kun 500 vortoj."

La astronauto diris: "250-oblo de necerteco" (necerteco ĉinlingve signifas du vortojn *nan shuo*).


Trejnisto: "Estas du objektoj, kiuj malhelpas vin fariĝi elstara piedpilkisto."

Centra avanulo: "Kiu?"

Trejnisto: "Viaj dekstra kaj maldekstra piedoj."

ONDA KRANIO

Mi opiniis mian hararon ondanta,  
Post la fortonto mi rimarkis,  
Ke mirinde ebenas mia hararo,  
Sed ondas mia kranio.



\* Monika Potasniczak, lernantino, dez. kor. kun ĉinaj kaj alilandaj esperantistoj. Adr.: Gutow 40, 63-450 Sobotka, woj. Kalisz, Pollando.

\* Pestrakov Sergej, 13-j., dez. kor. tm., interesigas pri sporto, lukartoj. Adr.: Str. Ŝolkovaja, Krasnojarsk, USSR.


\* Anita Krysztofiak, 14-j. lernantino, interesigas pri matematiko, sporto kaj muziko. Adr.: Zychlin 6, 63-324 Kuczkow, woj. Kalisz, Pollando.

\* Kossuth Gimnazium, 15-j., dez. kor. tm. pri ĉiuj temoj. Adr.: Dayka G ut 4 SZ, 3525 Miskolc, Hungario.


\* Monika Gorczak, 13-j. knabino, kolektas poŝtmarkojn, bildkartojn, glubildojn kaj kalendarojn. Adr.: Ladek Zdroy, ul. Kosciuszki 72/2, Pollando.

Avo kaj nepo (Karikaturo)

de MIAO DI



## KURANTAJ AFEROJ



Riĉa rikolto de greno

### EKONOMIO

● Ĉinio akiris riĉan rikolton en 1990. La totala produktokvanto de greno superis 420 milionojn da tunoj, la po-mua (1 mu-o=1/15 hektaro) produktokvanto estis pli ol 250 kg, la totala produktokvanto de kotono estis 4.25 milionoj da tunoj. La totala kampara socia produktovaloro de Ĉinio atingis 1 600 miliardojn da juanoj, je 90% pli multe ol en 1985.

● La eksporta valoro de la ĉina ekstera komerco superis 50 miliardojn da usonaj dolaroj en 1990. Ĝi estis 43.28 miliardoj da usonaj dolaroj en 1989 kaj 25.9 miliardoj da usonaj dolaroj en 1985, t.e. la lasta jaro de la Sesa Kvinjara Plano. La sumo de 1990 multe superis tiun difinitan en la Sepa Kvinjara Plano (1986-1990) (38 miliardoj da usonaj dolaroj).

● La Ĉina Ĝenerala Kompanio de Petrolo kaj Naturgaso publikigis antaŭ nelonge, ke en la pasintaj 10 jaroj Ĉinio produktis sume 1 226 milionojn da tunoj da nafto, kaj per tio Ĉinio okupis la kvinan lokon en la mondo. Laŭ informo, Daqing, la plej granda ole-produktejo en Ĉinio, produktis ĉiujare pli ol 50 milionojn da tunoj da oleo en la daŭro de 15 jaroj, kaj ĝia ekspluata tekniko jam atingis la avangardan nivelon de la mondo. Krome, Ĉinio trifoje sukcesis en prospektado de oleo kaj gaso en sia okcidenta parto. Estas antaŭvidite, ke Ĉinio daŭrigos stabilan altan produktadon de oleo kaj gaso en la venontaj 10 jaroj.

● Tibeto atingis bonan sukceson en utiligo de sunenergia. Nun tie estas sume 12 550 sunfornoj, sunĉambroj kun totala areo de 100 000 kvadrataj metroj kaj forcejoj kun totala areo de 750 000 kvadrataj metroj, kies jara ekonomia profito estas pli ol 10

milionoj da juanoj. Dank' al utiligo de sunenergia Tibeto ĉiujare ŝparas energion egalan al pli ol 20 mil tunoj da karbo.

● Ĉinio fariĝis la tria granda produktejo de moldiskoj en la mondo, post Usono kaj Japanio, kun jara produktokvanto de 300 milionoj da moldiskoj.

Faka institucio ekzamenis 19 specojn de moldiskoj produktitaj de 12 fabrikoj. La rezulto montris, ke la ĉinaj moldiskoj jam atingis la internaciajn normojn, iuj jam atingis la kvaliton de la mondfamaj produktaĵoj.

### SCIENCOJ KAJ TEKNIKOJ

● Piedira roboto, la plej multifunkcia en Ĉinio, sukcese trapasis la ekspertizon de fakuloj en Pekino.


La roboto kun du piedoj pezas je 16 kg kaj altas je 0.8 m. Foje en prezentado ĝi faris diversajn irmanierojn, stabile ascendis ŝtupojn. Post tio ĝi prezentis turnigadon, klinigadon kaj descendon de ŝtupoj, imite al homa moviĝo. La naskiĝo de tia roboto reprezentas la novan nivelon de Ĉinio en esplorado pri robotoj kaj havas gravan praktikan signifon en esploro de la ekstera spaco, alttekniko k.a.

● Ĉinio jam enbankigis 200 000 ekzemplerojn de ĝermoplasmo en la 5 jaroj de post 1986, kaj per tio ĝi okupas la duan lokon en la mondo. La unuan lokon okupas Usono.

La fonto de planta ĝermoplasmo estas riĉa je genoj, kiuj povas doni fajnajn genojn altproduktajn, bonkvalitajn, malsanrezistajn, antiinsektajn kaj malbonkondiĉo-rezistajn por kulturaj bonspeciojn. Dank' al disvolviĝo de la biologia inĝenierio, riĉfonto de planta ĝermoplasmo estas rigardata kiel nacia trezoro. Nun jam konserviĝas 160 specioj da plantsemoj en la ĉina ĝermoplasma banko, kiaj semoj de altproteina sorgo, virusrezistaj kolzo kaj arakido. Krome tie estas ankaŭ multe da sovaĝaj kaj kuriozaj riĉfontoj.

### HIGIENO

● La klinika ekzameno farita al pli ol 100 000 pacientoj por diagnozi fruan rinofaringan kanceron, per La piedira roboto



la originala "zimoimuna metodo", atestis, ke la procento de ekzakteco superis 90%.

Ordinare la frua rinofaringa kancero estas malfacile diagnozebla, sed la fruaj malsanuloj estas resanigeblaj. "zimoimuna metodo" farita de la Virusa Instituto sub la Ĉina Preventmedicina Akademio oni povas diagnozi, ĉu la ekzamenato suferos rinofaringan kanceron en la venontaj 5 jaroj, se nur oni analizas guton da sango de la ekzamenato.

● Ĉinio akiris rimarkindajn sukcesojn en la kampo de grefta medicino en la lastaj jaroj. Ĝis nun jam estis greftitaj 5 000 kazoj de 18 specoj da organoj. La nombro de plej efikaj reno-greffoj atingis 4 596 kaj tia grefto fariĝis unu el la efikaj metodoj por malfrua renomalsano kaj prostracio de rena funkcio. Krome, estas ankaŭ bonefike grefti histojn de cerbaj nervoj kaj cerbajn ĉelojn por kuraci parkinsonan malsanon, nanismon, koreon kaj cerboinertecon.

### TURISMO

● La pekina turismo okupis la unuan lokon per la nombro de turistoj kaj enspezo de eksterlandaj valutoj en 1990. 1992 estos difinita kiel "ora turisma jaro", t.e. la urbo kreos oran tempon por turistoj al Pekino. En tiu jaro la pekinaj turismaj servoj akceptos turistojn per favora prezo, abundaj programeroj kaj bonaj servoj.

● Huangshan-monto, fama pitoreskejo de Ĉinio, lastatempe estis difinita de Unesko kiel kultura kaj natura heredaĵo de la mondo kaj tio legiĝas en "Katalogo de la Famaj Mondaj Heredaĵoj".

Antaŭ tio, la Granda Muro, Imperiestra Palaco en Pekino, Maŭzoleo de la Unua Imperiestro de Qindinastio, Kaverno Mogao de Dunhuang kaj Restadejo de la Pekinaj Homoj ĉe Zhoukoudian, kiel "kultura restaĵo", kaj la monto Taishan, kiel "kultura kaj natura heredaĵo", estis enskribitaj en la supre menciitan libron.


● Sub la rubriko "Kurantaj aferoj" de la februara numero de la revuo EPC, 1991, publikiĝis la informo pri nove trovita granda kuŝanta budho-statuo ĉe la monto Leshan de Sichuan-provinco. Estas pli mirinde, ke oni trovis lastatempe nudan "dormantan belulinon" formitan nature el monto kaj tersurfaco en Shawan-distrikto de la urbo Leshan, je 30 km distance de la kuŝanta budho-statuo. Ĝi longas je 5 000 m, ĝia hararo etendiĝas ĝis rivero, ĝiaj kapo, nazo, lipoj kaj kolo estas klaraj, mampintoj elstaraj. Ĝi kuŝas kvazaŭ dormanta belulino post bano.

### KULTURO

● La eduka afero de la ĉinaj nacimalplimulto rapide disvolviĝis. Nun en la ordinaraj altlernejoj lernas 130 mil nacimalplimultaj studentoj, en la mezlernejoj kaj elementaj lernejoj lernas ĉ. 3.14 milionoj kaj 10.52 milionoj da lernantoj respektive. La 55 nacimalplimultoj en Ĉinio ĉiu havas siajn studentojn.

● Januare de la kuranta jaro la Pekina Popola Tea-

Sceno el la dramo "Reveno"



tro surscenigis la dramon «Reveno» de la fama sovetunia dramisto Aleksandro Galim. La dramo, priskribanta pri la soleca vivo de kvar maljunuloj per komedio kaj tragedio, montras ilian aspiron al kompreno kaj nova vivo. La dramo ĝuigas la spektantojn en la atmosfero de ĝojo kaj malĝojo. Ĝin reĝisoris juna artisto Ren Ming.

● "Ĉarmaj Montoj", la plej granda duflanka brodaĵo de Ĉinio, farita laŭ la antikva stilo, aperis lastatempe en la antikva urbo Yangzhou. Ĝi estas zorge brodita de 6 brodistinoj de la Yangzhou-a Belarta Instituto dum pli ol 600 tagoj.

Ĝi, 2.46 m longa kaj 1.84 m alta, konsistas el 6 gravuritaj ekranoj el palisandro. La artaĵo kun elegantaj koloroj bele montras la trajtojn de antikva ĉina pentrarto kaj ĝian profundan ideon.

● Antaŭ nelonge paro da ĉinaj malgrandaj pandoj enloĝiĝis en Portugalio. La malgrandaj pandoj estas mildaj. Ili kun mola kaj densa hararo havas dorson helbrunan, abdomenon nigran kaj vizaĝon blankan. Malgranda pando ĝenerale estas longa 60 cm kaj peza 3-4.5 kg., multe malpli granda ol granda pando.

Laŭ informo, la paro da malgrandaj pandoj, naskiĝintaj en Sichuan-provinco, sudokcidente de Ĉinio, estas donacita de la Ĉina Protekta Asocio de Sovagaĵ Bestoj al la Orienta Fonduso de Portugalio.

● En la mondo troviĝas sume 44 specioj da mevoj. Pri 43 el ili oni jam faris profundan esploron, sed la studo pri la nigrabeka mevo ankoraŭ ne estas komencita.

En 1990, kiam ĉinaj kaj alilandaj fakuloj faris kuman esploron en Shuangtaihekou-naturparko de Liaoning-provinco, nordorienta Ĉinio, ili neatendite trovis grandarean reproduktejon de nigrabekaj mevoj kaj iliajn nestojn, ovojn kaj idojn kaj akiris koncernajn datenojn. Ili faris valorajn fotojn kaj unuapaŝan esploron pri la formo, generado kaj nutraĵ-serĉado de la mevoj. De tiam la nigrabeka mevo fariĝis fama "ĉina trezoro".



# La Unua Ilmaŝina Fabriko de Jinan, Ĉinio

La nomita fabriko estas ŝlosila fabriko de la grupa kompanio "Blanka Ĉevalo", kies entreprenoj troviĝas en pluraj lokoj de Ĉinio. Ĝi produktas seriojn da program-regataj ilmaŝinoj, kiaj  $\varnothing 250$ ,  $\varnothing 320$ ,  $\varnothing 360$ ,  $\varnothing 460$ ,  $\varnothing 530$ , MAZAK kaj MATK, sume 31 kategoriojn kun pli ol 80 specoj da ilmaŝinoj ordinaraĵoj, precizaj kaj program-regataj.

Ĝiaj ilmaŝinoj vendiĝas en Usono, Japanio, Francio, Germanio, Italio, Aŭstralio, Filipinoj kaj aliaj, sume pli ol 80 landoj kaj regionoj. La fabriko havas siajn servojn en Usono kaj Germanio. Ĝi estas tre vigla sur internacia merkato kaj ĝuas altan renomon kaj multan laŭdadon de fremdlandaj komercistoj, dank' al bona kvalito kaj precizeco de siaj varoj.

La fabriko volonte kontaktiĝas kun industriistoj kaj komercistoj en ĉiuj mondpartoj kaj servas al siaj uzantoj.



**Adreso: Str. Jingqi 382, Jinan,  
Shandong, Ĉinio**

**Telefono: 663300, 35591**

**Telegramo: 1254**

**Telekso: 39120 MCTJN CN**

**Telefakso: 86-531-38080**



La plurfunkcia programregata ilmaŝino  
J1FCNC1

# Jurto — domo sur stepo

Teksto kaj fotoj de WU XINHUA


**L**A bulijata mongol-nacieco ĉe Xini-rivero sur la stepo Hulun Boir estis nomada nacieco kaj nun plejparto el la tieaj mongoloj fiksloĝas sur la stepo, tamen en iuj lokoj ankoraŭ vidiĝas sporadaj ter-jurtoj.

Ter-jurto aspektas kiel feltaj-jurto. Ĝi estas konstruita el vimenoj kaj kovrita per tero. En la jurto

estas sternita ligna planko. Vintre sur somera paŝtejo vidiĝas nemalmultaj ter-jurtoj vakaj. Paŝtistoj diris, ke kiam la mastroj revenas printempe, ili devas iom ripari la ter-jurtojn, antaŭ ol enloĝiĝi.

Pli multe da tiuj mongoloj kutimiĝantaj al nomadismo uzas tradician feltan jurton. Ĝi estas tipa nomada loĝdomo en la norda parto de Ĉinio kaj facile portebla. Ĝi karakteriziĝas per simpleco, fa-

Sur herbejo ĉe Weitehen-rivero



cila muntado kaj rezisto kontraŭ vento kaj malvarmo. Plejparto de la mongoloj en aliaj lokoj de Ĉinio, evenkioj kaj daŭr-oj en la Nordoriento kaj kazakoj kaj taĝikoj en nordokcidenta Ĉinio uzas similajn feltaj jurtojn. Kaj la malsameco estas nur en alto, formo kaj nomo, tamen estas samaj la devenoj de la strukturo kaj eĉ kulturo pri loĝdomo kaj moroj, kia prapatra fajroadoro.

Por foti edziĝan ceremonion de mongoloj, en frua vintro mi veturis per traktoro, kiu transportis furaĝon, kaj atingis herbejon en longa valo ĉe Weitehen-rivero. Tie mi vidis, ke paŝtistoj konstruas jurton por novaj geedzoj. Laŭ informo, la tieaj eminentaj viroj ĉiuj partoprenis la aktivadon. Tiam mi bone vidis, ke konstrui novan jurton estas solena ceremonio. La maljunuloj kun serioza mieno kunligis lignajn bastonojn kun longo de pli ol du metroj en rondforman barilon. La patro de la novedzo estis prezidanto de la ceremonio. Starante en la centro de la korto, li alte levis permane la tegmentan volbon, kvazaŭ li irus renkonte al la radianta suno (mongoloj kaj aliaj nomadoj de la norda parto de Ĉinio adoras la sunon, lunon, ĉielon, teron kaj fajron); kaj helpantoj metis dekojn da brile lakitaj lignaj stangoj sur la volbon, ke formiĝis tegmenta framo de jurto simila al ombrelotenilo. Poste la patro de la novedzo kun serioza mieno portis feran fornon en la jurton. Tio signifas, ke oni venigas fajron, kaj ke dank' al tio, la mastroj de la nova loĝejo estos benataj de fajro-diino kaj la familio prosperos de generacio al generacio.

Post momento neĝegis. Malgraŭ tio, oni ankoraŭ estis okupata, ĉar ili devis finkonstrui la novan jurton antaŭ la alveno de la novedzino. En palpebruma daŭro la framo de la nova jurto estis kovrita per unu-du tavoloj da dikaj feltoj kun bonaŭguraj

brunlanaj bildoj kudritaj de paŝtistoj mem. Sur parto de la framo kaj la finoj de lanŝnuroj estis ligitaj kvinkoloraj silkkrubandoj kun signifo de kvinkoloraj flagoj de sutro. Oni ligis feltojn per lanŝnuro kaj la nova jurto estis finkonstruita.


Tiam la patro de la novedzo oferverŝis vinon al la ĉielo kaj tero, dum la maljunaj helpantoj estis invititaj trinki buterteon en malnova jurto. Kiam la viroj konstruis jurton, la virinoj preparis edziĝan festenon en malnovaj jurtoj. La malnovaj jurtoj atakataj de vento kaj pluvo ankoraŭ estas fortikaj kaj varmizolaj. En ili oni vivas kiel antaŭe. Io malsama estas nur ke la plenkreskaj gefiloj forlasos la jurtojn kaj konstruos sian propran hejmon sur la stepo.

Post la finkonstruiĝo de la nova jurto oni svarme eniris ĝin kaj sub la gvido de maljunulinoj ili dekoraciis la jurton. Laŭ kutimo, en la mezo de ĝi estas forno. Apud la pordo metiĝas malalta rektangula tablo kaj dekstre de ĝi — vestokestoj kaj aliaj mebloj. Oni sternis felton kaj bov- kaj ŝafelojn ĉirkaŭe. Tamen apud la forno ankoraŭ montriĝas antaŭa herbejo. Laŭ kutimo, la fronta kaj maldekstra flankoj de la pordo estas lokoj por gastoj kaj pliaĝuloj de la familio kaj en la dekstra flanko metiĝas delikata kupra lito, kiu pleniĝas de novaj litaĵoj.

La meblaro en la nova jurto estas sama, kiel en la malnova. En la nova jurto mankas nur ĥamako por infano kaj budha altaro. Mi opiniis, ke la paŝtistoj de la nova generacio ne kredas je lamaismo, sed el la edziĝa ceremonio mi sciigis, ke la Budho devas esti respektoplene invitita de la patro de novedzo en novan jurton.

Iom post iom mian nazon tiklis aromo de vian-

Jurtoj kaj feraj kestegoj






dajo el malnova jurto. Elirinte el la jurto, mi vidis, ke homoj en festaj vestoj, rajdante aŭ piedirante, venas el najbaraj vilaĝoj por ĉeesti la edziĝan festenon. Sur palisoj oni ligis ĉevalojn; antaŭ la nova jurto svarmis vilaĝanoj, kiuj rigardis novajn meblojn en ĝi. Ĉe la proksima Weitehen-rivero paŝtistoj prenis akvon por trinki ĉevalojn. Sunlumo elnubiĝis kaj ĵetis sin sur gajan herbejon.

Tiam la virinoj de la familio de la novedza patro kolektiĝis antaŭ vico da feraj kestoj malantaŭ la jurto kaj pretigis vestojn por la novedzo kaj donacojn por gastoj. Tiuj kestoj estas konsistiga parto de la loĝejo de tieaj mongoloj. Ili konservas plejparton da vestoj kaj aliaj objektoj en la kestoj. Mi rimarkis, ke multaj personoj, kiuj loĝas en brikdomoj, ankoraŭ uzas tiajn kestojn.

El tio facile imageble, kiel la antaŭuloj de la tieaj mongoloj migris de la malproksima Bajkalo al la stepo Hulun Boir: Miloj da ĉaroj plene ŝarĝitaj per feraj kestoj kaj dispartigitaj jurtoj moviĝas antaŭen; maljunuloj kaj infanoj sidas en kaleŝoj; viroj, rajdante surĉevale, pelas brutojn; junuloj rajdante kuras kaj amuziĝas ĉe la vicaro.

Vespere, la novedzino kaj ŝiaj parencoj eniris la novan jurton, tri fojojn ĉirkaŭveturinte la jurton de la novedzo. Tio okazis, ke en vintro edziĝa ceremonio devas havi lokon en jurto anstataŭ sub la ĉielo. Oni sidis ĉe tablo laŭ generacio kaj ĝuis



En tegado de jurto per 1-2 tavoloj da felto

#### Aranĝado en nova jurto







Mastroj de nova jurto

Preparado de edziĝa festeno en malnova jurto

interparolon, kanton kaj ludon. Por gejunuloj ĉeesti edziĝan ceremonion estas bona ŝanco konatiĝi unu kun la alia kaj trovi sian amat(in)on. Oni diris, ke la novgeedzoj ja konatiĝis unu kun la alia ĉe edziĝa ceremonio de siaj amikoj. La novaj geedzoj, sidante en la varma nova jurto, aŭskultis la kantadon de la gefratoj de la novedzino pri adiaŭo, kaj de tempo al tempo sur iliaj vizaĝoj aperis feliĉa mieno...


Rigardante ĉion ĉi, mi demetis mian fotilon kaj kunmetis la manojn por beni miajn mongolajn gefratojn. ■





Konstruado de jurto por novaj geedzoj

Paŝtistoj konservas vestaĵojn en ferkestego.



En jurto



## De kie komenciĝas la Antikva Silka Vojo?

Kutime oni rigardas la nunan Xi'an kiel la komencon de la antikva Silka Vojo de nordokcidenta Ĉinio. Sed de kie venis silkaĵoj transportitaj de la urbo al la Okcidentaj Regionoj? Lastatempe iuj fakuloj opinias Shandong-provincon la ĉefa komenco de la Silka Vojo.

En la Okcidenta Han-dinastio (206 a.K.-23 p.K.) Zhang Qian servis kiel sendito al la Okcidentaj Regionoj, kio malfermis la vojon de Ĉinio al la Okcidento. Tio ja estis la fama Silka Vojo en la ĉina historio. La vojo komenciĝis de la tiama ĉefurbo Chang'an (nun Xi'an). Historia libro diras, ke la produktokvanto de silko ĉirkaŭe de Chang'an estis tre malgranda. Tial, kiel la komenco de la Silka Vojo, Chang'an servis nur kiel staplourbo. La silkaĵoj, transportitaj al la Okcidentaj Regionoj kaj la Okcidento, venis de aliaj lokoj.

Fakuloj opinias, ke la plej prospera periodo de la Silka Vojo koincidis kun la plej granda disvolvigo de la silka industrio en Shandong. La statistiko farita laŭ koncernaj ciferoj de Tang-dinastio (618-907) montras, ke la imposto de silkaĵoj pagita de Shandong okupis siatempe la unuan lokon en la lando, kaj la tributitaj silkaĵoj de Shandong konsistigis pli ol 96% en la totala kvanto de tiuj de ĉiuj provincoj. Sufiĉe granda kvanto de silkaĵoj el Shandong estis transportita alilanden laŭ la Silka Vojo. Pro tio fakuloj opinias, ke Shandong estis la plej grava liverejo de silkaĵoj transportitaj sur la Silka Vojo en Tang-dinastio kaj la ĉefa komenco de la Silka Vojo. Fakuloj montris ankaŭ, ke la freskoj en ŝtontomboj de la Norda Qi-dinastio (550-577), trovitaj en Qingzhou-prefektujo de Shandong kaj spegulantaj silkaj-komercon de la provinco, estas solida atesto pri tio.

Fakuloj asertas, ke oni devas fari pluapŝan esploradon laŭ arkeologio kaj historio por atesti la tezon, ke Shandong estas la ĉefa komenco de la Silka Vojo.

## Ĉu Granda Pando Estas Urso aŭ Kato?

La nomo "granda pando" estas ĝenerale konata. Sed la diskuto, ĉu ĝi estas urso aŭ kato, daŭris pli ol cent jarojn.

En 1860, kiel franca predikisto opiniis, nescienca estis tio, ke la vilaĝanoj de Sichuan, hejmloko de grandaj pandoj, nomas la raran beston blanka urso aŭ makula urso. Li donis al ĝi la nomon nigra-blanka urso. Tio vekis malsamajn opiniojn inter la sciencistaj rondoj. Oni trovis pli nescienca tute ekskluzivi la econ de "kato". Sekve, en la libro "Mambestoj" kaj aliaj akademias verkoj ĝi estas nomata granda pando.

La diskuto pri la nomdono de la granda pando daŭris 120 jarojn kaj venis al la komuna kono pri ĝi.

Lastatempe, esplorante karnovorulaj fosiliojn elfositajn en Lufeng de Yunnan, loĝejo de simiĥomoj, sciencistoj de la Vertebrula kaj Paleoantropologia Instituto sub la Ĉina Akademio de Sciencoj trovis, ke la strukturo de la dentoj de iu malgranda urso havas karakterojn de tiu de pando kaj praurso, kun geologia erao de 8 200 000 jaroj. Ĝi estas reprezentanto de la plej fruaj grandaj pandoj ĝis nun konataj en la mondo. Ĉinaj sciencistoj nomas ĝin arkeopando.

Tiu eltrovo liveris sciencajn atestojn por solvi la longtempan diskutadon pri origino kaj klasifiko de la granda pando. Ĉinaj sciencistoj kolektis milion da specimenoj de fosiliaj pandoj kaj faris komparan esploradon pri la strukturoj de dentoj de la granda pando, malgranda pando, nigra urso kaj praurso, helpe de elektronika mikroskopo. La rezulto atestas, ke la granda pando originas el la praurso de la familio de ursedoj. Laŭ klasifiko ĝi apartenas al la familio de ursedoj kaj ne al tiu de katedoj kaj aliaj. La granda pando estas propra al Ĉinio, tial la aserto de la ĉinaj sciencistoj estas plej aŭtoritata.

## Videobendo "ĈINA MASAĜO"

Ĉu vi volas posedi la teknikon de masaĝo? Por tio vin helpos la videobendo "Ĉina Masaĝo". La videobendo 75-minuta prezentas al vi la masaĝan teknikon por kuracado de oftaj malsanoj, kiel kontuzoj, ostologiaj kaj internaj malsanoj. "Ĉina Masaĝo" en Esperanto PAL (VHS) kostas 80 usonajn dolarojn. Dezirantoj bonvolu sendi la monon al: El Popola Ĉinio P.O. Kesto 77, 24 Baiwanzhuang Lu, Fuchengmen Wai, Pekino, 100037, Ĉinio.



# Glazura Pagodo Feihong

Fotoj de YAN JIN

En la templo Guangsheng norde de la guberniurbo Hongtong, Shanxi-provinco, staras glazura pagodo. Rigardate de malproksime, la pagodo bunte brilas en la sunlumo, kvazaŭ fluganta ĉielarko. Tial oni donis al ĝi la nomon Pagodo Feihong (en la ĉina lingvo Feihong signifas flugantan ĉielarkon).


La ok-angula 13-etaĝa pagodo estis konstruita en Han-dinastio (206 a.K. — 220 p.K.) kaj la lasta riparado plenumiĝis en 1527. La 47-metra pagodo havas pokalforman pinton. Sur la soklo de la pagodo ĉirkaŭas portiko. Interne de la pagodo ŝtuparo kondukas ĝis la 10-a etaĝo. La pagodo estas masonita el brikoj. Sub la aleroj de la etaĝoj alterne subtenas glazuraj konzoloj en formo de lotusflora petalo. Sur ĉiuj flankoj de la 3-a ĝis la 10-a etaĝo estas niĉoj kaj pordoj. La eksterajoj de la 2-a ĝis la 13-a etaĝo estas konstruitaj el glazuraĵoj, kiaj konzoloj, kolonetoj, lotusfloroj, budhostatuoj, drakoj, floroj kaj bestoj.

La majesta pagodo Feihong estas tre rara el la glazuraj pagodoj ekzistantaj en Ĉinio.



# La Nacia Cirka Trupo de Sove- tunio en Ĉinio

Kamelorajdado



Fotoj de **CAI HAIFENG**

La nomita trupo ĝuas altan renomon en la mondo per sia eminenta arto kun riskeco, komikeco kaj spriteco.


Fine de la 50-aj jaroj ĝi turneis en Ĉinio kun sensacio. En la lasta jaro ĝi refoje vizitis Ĉinion kaj prezentis en Pekino, Kanton, Shenyang kaj Wuhan, kun sukceso multe pli brila ol la antaŭa.

Hundo tiranta ĉaron



Dresado de kolomboj

Cirklo-turnado



# Kajtoj

Kajtoj de Ĉinio havas historion de pli ol 2 000 jaroj kaj nun estas konataj kiel tradiciaj metiartaĵoj. Laŭ strukturo la kajtoj dividiĝas en kvar kategoriojn: malmol-flugila, mol-flugila, plata kaj tridimensia. Ĉinio emisiiis sume du seriojn da poŝtmarkoj pri kajtoj. La unua serio da poŝtmarkoj (kvar pecoj en la tria vico), emisiita en 1980, surhavas malmol-flugilajn kajtojn kun figuroj de hirundido, malgrasa hirundo, duongrasa hirundo kaj parahirundo. Du el la kvar pecoj da poŝtmarkoj (en la unua kaj dua vicoj), emisiitaj en 1987, surhavas malmol-flugilajn kajtojn kun figuroj de aglo kaj fenikso, la tria surhavas platan kajton kun figuro de antikva ĉina ok-diagrama aŭgurilo kaj la kvara surhavas tridimensian kajton en formo de drakkapa skolo-pentro.

